

esperanto USA

1992(1)

The ELNA Newsletter: News of the Language Problem and Esperanto as the solution

Making News This Issue

ELNA and EANA

Forty years ago ELNA was founded. Why? How? David Richardson, author of *Esperanto • Learning and Using the International Language*, starts off our anniversary year by answering these questions.

See Page 7

John Starling

This is the first of a series of articles introducing the members to some of this country's more active participants in the Esperanto movement.

See Page 9

Another Inch on the Shelf

Short reviews of a detective novel (*Urd Hadda Murdita!*), a teaching aid (*Frekvenmorfemaro de parolata Esperanto*) and a romance novel (*Insulo de Revoj*).

See Page 14

In This Issue:

History and Language 2

Esperanto or English? 5

Letters 10-13

And Much, Much More to Delight and Inform You!

San Francisco State

SFSU AND LATIN AMERICA

by Derek Roff

ELNA. ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA. How often do we read those words without thinking about what they mean? North America is a pretty big place, stretching from tropical Panama and the Caribbean to Arctic Alaska and Canada. Do we really claim to represent all that territory? Maybe not. We're the league *FOR* North America, not *of* North America. What's the difference? To me, it means that wherever our members may live, we have dedicated ourselves to work with all regional, national and international organizations, for the advancement of Esperanto in all of North America. We will do what we can to help and support Esperanto and esperantists everywhere on the continent.

What can we do? What have we done before? What is common in the needs of so many diverse esperantists in such different places? Everywhere, there is the need for education. Everywhere, we need a few key people who have learned the language well, who can serve as the nucleus for further action. Individuals who have the knowledge and training to teach the language, to organize local groups, to present our case to their communities and educational bodies, to guide their regional and national organizations.

ELNA members can be proud of what we have done to fill that need. Through the untiring work of Cathy Schulze, ELNA has supported the Esperanto Program at San Francisco State University through 22 years. We have seen the success of the SFSU program in training and inspiring those esperantists who have become the local authorities, teachers and motors of the movement. In America

and Canada, there are too many to count who have benefitted from the outstanding classes. In the rest of North America, the quantity of our students has been lower, but the quality is undiminished. In Mexico, Haiti, and Puerto Rico much of the leadership graduated from SFSU. In Puerto Rico particularly, the list of aktivuloj reads like a SFSU class roster. We have done well in the support of Esperanto education. Especially in those countries, we have really made a difference.

And we can do more. We are seeing a flowering of interest in Esperanto in several Latin American countries right now. The Cuban movement has taken off. Guatemala and Nicaragua have growing groups. Unprecedented interest and activity has appeared in Ecuador and Peru. The Chilean movement is reawakening and reorganizing. This is a time of opportunity which can be sustained, if local enthusiasts can be given the training and contact to make them the foundation for future Esperanto activity. We can make our best effort, the Esperanto program at SFSU, more effective, if we can make it accessible to more people from more countries. We can make a difference by supporting the scholarship program for SFSU.

Many American and Canadian esperantists benefit from the courses and scholarships at SFSU. Many more would love to study at SFSU, but few can take enough time off from work and other responsibilities to realize that dream. Few Latin Americans have the money to make the trip and then pay the tuition and lodging in US currency. Yet they have the time, energy and enthusiasm to ben-

Daŭrigo sur paĝo 15

EDITORIAL

HISTORY

This year, 1992, marks the 500th anniversary of Columbus's discovery—for better or for worse—of the Americas. It also marks the 40th anniversary of the creation—for better or for worse—of ELNA.

Anniversaries of this sort can be pleasant or unpleasant. As I write this, we have recently enjoyed—or been subjected to—weeks of reminiscences on the occasion of the 50th anniversary of the bombing of Pearl Harbor by Japan. For an entire week, the Oakland *Tribune* ran a major series of articles about the attack. Most of Saturday, December 7, was given over to television programs about Pearl Harbor. All of which was confusing to my children, who know little about Pearl Harbor and, in this era, care less; nor was I much more interested, since I have no memories of that time—I was only a (very tiny) fetus on that date in 1941.

It seems that Columbus's discovery of America will not lead to quite as much controversy. After all, Columbus, those who participated in his discovery, and those who were most affected by it, whether favorably or adversely, are all safely dead, and have been so for quite some time. A Romanian Esperantist wrote me last year asking for the address of the official U.S. committee in charge of the Columbus quincentenary. This address was not easy to come by, the committee's operations and deliberations being heavily shrouded in indifference. I finally got the address from my Congressman.

Nevertheless, there has been some complaint from the historical revisionists on the grounds that the Admiral was a genocidal pillager; and there is also the interesting possibility of a certain amount of litigation between two motion-picture companies filming competing movies of a (presumably highly romanticized) life of Columbus. So Chris may not get through this anniversary year completely forgotten.

Esperantists can probably find several anniversaries in this year, including a Centennial, if they look hard enough. For

those of us in the United States, 1992 marks the 40th anniversary of the founding of ELNA. This, like Pearl Harbor or Columbus's discovery of Hispaniola, has also not been without its controversial aspects. These are detailed at some length in David B. Richardson's article in this issue. It will, I hope, answer a number of questions that I often hear—and have myself often asked—about the circumstances surrounding ELNA's genesis.

Incidentally, the other two anniversaries also had their language-problematic aspects. According to a comment in one of those *Tribune* articles mentioned above, the bombing of Pearl Harbor was an unprincipled and vicious sneak attack, and not a legitimate act of war, precisely because the Japanese officials in Washington who were to present their Declaration of War to Secretary of State Cordell Hull ran into last-minute translation problems—problems that delayed the delivery of the Declaration until after the attack on Pearl Harbor. There is a story that this problem was mirrored at the other end of the war—to whose 50th anniversary we shall no doubt be subjected in 1995—when American misunderstanding of an ambiguous word in a Japanese communication led to the second atomic bomb being dropped on Nagasaki.

And Columbus? Again, there is a persistent story that the Great Navigator and Admiral of the Ocean Sea, when he set out from Cadíz, had aboard the *Santa Maria* a sailor who was conversant with the Hebrew language—because Columbus was firmly convinced that Hebrew was the ancestor of all languages, and that the Chinese-speakers he would encounter in the Indies would therefore be able to communicate with this Hebrew-speaking sailor. History is regrettably silent as to whether this idea worked out when Columbus unexpectedly encountered the Taino in the Caribbean.

To celebrate the 40th anniversary of the founding of ELNA, *Esperanto U.S.A.* will be publishing two special series of articles. One series will touch on some of

Esperanto's more interesting achievements during that forty year period. David Richardson, author of *Esperanto • Learning and Using the International Language*, has already provided a description of the conflict that led up to the foundation of ELNA; Dr. William Solzbacher will tell us some of the history of the use of Esperanto at the Voice of America in the late fifties and early sixties; and there will be others.

A second series will introduce to you some of this country's most active and hard-working Esperantists. You'll know the names of a few of them from this magazine's pages; but I suspect that many of them are unknown to most of you. Yet these people help make up the backbone of the American Esperanto movement. Here is your chance to find out what they are thinking.

A change that you will notice in this issue is the disappearance of the "Local Contacts" column. This column is disappearing for three reasons: (a) it took up too much space for a repetitive item, despite the miniscule type size used in it; (b) it was too hard for me to keep track of the validity of the various addresses listed; and (c) in any case, the Central Office of ELNA keeps a similar list, which it will provide automatically to all new members and, upon request, to others.

Still, there is a way to keep your group's address in *Esperanto U.S.A.* From now on, if your group's activity is reported in the column "Regional Reports," I will include the latest address and phone number that I have for the group. So all you have to do is make sure that you have activities to report; and that you actually report them. This can be done in two ways: (a) send the editor a letter, either at the ELNA Central Office or at my own address (P.O. Box 551, Pinole, CA 94564); (b) describe the activity in your local newsletter and make sure I get a copy, preferably through the Pinole address.

Don Harlow

NEWSBRIEFS

Esperanto in the Media

Richard Seitz of the Berkshire, MA, *Eagle* (January 2, 1991) describes long-time Esperantist Allan Boschen as "A Quixote for Esperanto" in a three-column article about Mr. Boschen's work for Esperanto. The article goes into Esperanto's history in some detail, but Mr. Seitz's self-described "research" about Esperanto also provides him with some wrong answers. (article reprinted in *Verda Lumo*, Nov. 1991)

Allan C. Boschen, in a letter to the Berkshire, MA, *Eagle* (February 21, 1991), responds to several points made by Richard Seitz, in the article mentioned above. (letter reprinted in *Verda Lumo*, Nov. 1991)

"Pushing pawns in Podebrady," an article by Roger Blaine and Dan Shenk of the Elkhart, IN, *Truth* (Aug. 11, 1991) describes Blaine's participation in the Esperantist Green (Chess) Olympics in Podebrady, Czechoslovakia, in July, 1991. It includes Blaine's game against Soviet player Valeri Groshev of Bryansk. (sent by Roger Blaine)

ELNA member Arlyn Kerr offers "A word on behalf of Esperanto" in the letter column of the Bellevue, WA, *Journal American* (September 30, 1991). Kerr proposes that the study of Esperanto can be just as useful as the study of Latin, not only for improving a student's vocabulary, but also for enhancing logical thinking. (sent by Arlyn Kerr)

CompuServe Magazine (September, 1991) contains an article "Trading Tongues" which mentions the existence of Esperanto files in the CompuServe Foreign Language Forum (GO FLEFO). (sent by John Massey)

"Professor spreads the global word," says Julia Hall in a five-column article in the Capaha, MO, *Arrow* (October 2, 1991) about Prof. Rod MacIntosh, associate professor of Spanish and French. The article quotes MacIntosh at length about Esperanto's creation, the fact that it is widely used around the world, and something of its history. (sent by Cathy Schulze)

Poor Arnie Becker (Corbin Bernsen) of

L.A. Law (October 17, 1991)! Sitting in for a friend as anchor of a TV news program and faced with a story that he hadn't rehearsed, he suddenly found, as he later confessed to his friend Roxanne, that it "had become meaningless—like it was in Esperanto or something!" (noted by Sybil Harlow)

In an article about Prof. Ronald L. Glossop's visit to Beatrice, NE, as part of United Nations Week, Cindy Wostrel of the Beatrice *Daily Sun* (October 24, 1991) mentions Prof. Glossop's support of Esperanto. She quotes Prof. Glossop as believing that "knowing the language would provide allegiance to the world community." (sent by June K. Fritz and Ron Glossop)

"Esperanto urged as part of just new world order" is an article by Jolene Daib in the Lincoln, NE, *Journal-Star* (October 27, 1991) that describes Prof. Ronald Glossop's visit to Nebraska (see above). The article devotes much space to the need for Esperanto as part of a just new world order. (sent by June K. Fritz)

In his column "Nibbles & Bits," Charles Olsen, Reviews Editor of *The Hal-PC User Journal* (October, 1991), leads into a review of The Marlboro Group's flashcard program Memory Master by spending four paragraphs describing his recent study of Esperanto. Olsen's only criticism of the program "involves the 50-line (25-card) limit in the study files. ... Someone studying an easier language like Esperanto might prefer to work with much larger files." Olsen also gives ELNA's address and phone number. (sent by Cathy Schulze)

After last year's display of overweening self-involvement by the Chicago, IL, *Tribune* (Editorial of EUSA 1990(7), "Newsbriefs" in 1991(1)), Jessica Seigel's long article on Esperanto "The language that's also a state of mind," appearing in the "Tempo" section (November 7, 1991), comes as a pleasant surprise. Despite an occasional lapse into mild irony, the article is generally balanced and well-researched. Among Esperantists interviewed for the article: R. Kent Jones, long-time motor of the Esperanto movement in Chicago; Tony Gravagno, President of the Chicago club;

Mike Donohoo, Director of the ELNA C.O.; Chicago Esperantists Dr. Gertrude Novak, Arvydas Kazluoskas, and Charlie Gunn; and a number of Esperanto students and their parents from the Louisa May Alcott School. The article includes ELNA's (800) number, resulting in some 70 requests for information. (sent by Prof. Frank Nuessel)

The Toastmaster magazine *The Fourcaster* (Fall, 1991) mentions in an article on "Specialty Clubs" by Bob Ingram that such clubs exist "for Toastmasters who wish to practice their speaking skills in a language other than English (e.g., ... Esperanto)." (from the ELNA C.O.)

In a sidebar to his review of the MS-DOS music sequencing programs Ballade, Trax and Master Tracks Pro in *New Media* (November/December 1991), Christopher Yavelow describes MIDI (Musical Instrument Digital Interface) as "a sort of 'synthesizer Esperanto'." Sorry, Chris. There are at least three different MIDI formats ... but only one Esperanto. (from the ELNA C.O.)

The Texarkana, TX, *Gazette* (December 1, 1991) devotes most of the first page of its "Accent" section to a five-column article "Esperanto: Language of hope" by Lyn Blackmon, about Esperantist Reg Reid (color photo included in the article). Reid discusses not only the reasons behind Esperanto, but also something of its history and much of its grammar. (article provided by Cathy Schulze)

The Canadian Broadcasting Corporation's popular daytime TV magazine-type show "Midday," seen coast-to-coast in Canada, included an excellent segment on Esperanto in its broadcast of Dec. 5, 1991. Esperantists in Nova Scotia were interviewed in a particularly competent and interesting presentation. Host Ralph Van Mergui even ended the segment with the words "Ni revenos baldaŭ" instead of the usual "We'll be right back." (reported by David B. Richardson)

A short letter by R. Kent Jones, "Esperanto for All," appears in *World Press Review* (December, 1991). (reported by Frederick B. Schoener and Ron Glossop)

"Even though there were only four people present at the Esperanto section meeting at last year's MLA annual meeting, they were a dedicated group," advises

Daŭrlgo sur paĝo 8



REGIONAJ KAJ FAKAJ RAPORTOJ

Esperanto-Agado en Usono

CALIFORNIA

La Tut-Kalifornia Esperanto Konferenco de 1992 (vidu la rubrikon "Anoncoj") denove okazos en la Ŝtata Departemento de Edukado; ĝin gastigos d-ro John Church, grava ano de la Departemento kaj patro de la Prezidanto de la Esperanto-Societo de Sakramento. La konferenco estos oficiale listigita kiel "Information Resources for the 21st Century" en oficialaj informiloj de la ŝtato. (raportis la monata bulteno de ESOS, oktobro, 1991) E-o-Societo de Sacramento, P.O. Box 60860 Mathews, Sacramento, CA 95860, (916) 485-3116

Je la 25a-27a de oktobro okazis 13a Nordkalifornia Senkrokodiliga Semajnfino en la YMCA sur la Terkapo Marin. 15 esperantistoj partoprenis. La temo de la Semajnfino estis "Rilatoj inter ELNA kaj Lokaj Grupoj", kaj ĉeestis homoj el grupoj en la Golfa Regiono, Sacramento, kaj Reno, NV. Prelegantoj enkludis: Mike Donohoo, Direktoro de la C.O. de ELNA; Don Coleman, Sekretario de la Ligo de Orient-Golfaj Esperantistoj; kaj Don Harlow. Oni menciis i.a., ke la C.O. de ELNA intencas aperigi specialan kvaronjaran bultenon aŭ novaĵleteron por plibonigi komunikadon inter lokaj grupoj kaj ELNA. Ligo de Orient-Golfaj E-istoj, Box 324, Berkeley, CA 94701-0324, (510) 770-1452

La 30an de decembro okazis Esperanto-Seminario ĉe la jarkunveno de la Modern Language Association en San Francisco. Ĉeestis entute 12 aŭskultantoj (sed neniu ĵurnalisto de *Chicago Tribune*...). Prelegantoj estis Prof. Myron Bondelid de California Lutheran University (pri Esperanto kiel pontlingvo en maŝintradukado), Prof. Pierre Ullman de la Universitato de Wisconsin (pri komparo inter la historiaj situacioj de la angla kaj Esperanto), kaj Prof. Paul Lloyd de la Universitato de Pennsylvania (pri la demando, ĉu Esperanto estas latinida lingvo).

CONNECTICUT

"Tradukado estas interpretado"—tiun titolon portis lastatempa simpozio pri tradukado de la angla poeto Shakespeare ĉe la Universitato de Hartford, Usono. Ses diskutantoj prezentis kaj pridiskutis ses

tradukojn de Soneto 29 de Shakespeare, en la franca, hebrea, rusa, germana, itala—kaj Esperanta. Profesoro Humphrey Tonkin, prezidanto de la Universitato, respondecis pri la Esperanta parto de la programo, prezentante al la 60-persona partoprenantaro la tradukon de la koncerna poemo farita siatempe de William Auld. Ĝi estis tre bone akceptita de la ĉeestantoj. La programon prizorgis Prof. Mel Goldstein, de la fako pri angla literaturo ĉe la Universitato. Prof. Goldstein instruas la anglan kaj la jidan. Aliaj partoprenantoj en la prezo estis profesoroj Richard Greeman (franca), Jonathan Rosenbaum (hebrea), Svetlana Rozovsky (rusa), Kristina Russell (germana), John Smurthwaite (itala). (raportis Humphrey Tonkin)

La 8an de decembro prelegis pri Esperanto ĉe la First Church of Christ en la urbo New Britain d-ro Gisela Macioszek, psikologo ĉe la Universität der Bundeswehr en Hamburgo, Germanio. Ŝi restis ses monatojn en New Britain kiel gast-profesoro de Central Connecticut State University. En sia prelego antaŭ dekduo da interesitoj d-ro Macioszek donis bonegan trarigardon pri Esperanto kaj ĝiaj celoj, aparte en la kadro de la nuntempa eŭropa lingva babelo. Ŝi lerte respondis al la demandoj de kelkaj skeptikuloj, kiuj asertis, ke Esperanto estas senviva lingvo, sen kulturo, sen literaturo ktp. Anonco pri la prelego aperis la antaŭan tagon en la loka ĵurnalo de New Britain. (raportis Jerry Veit)

La 15an de decembro la nove fondita Sud-Novanglia Esperanto-Societo festis la naskiĝtagon de Zamenhof ĉe la Universitato de Hartford. Partoprenis 15 esperantistoj el Connecticut kaj okcidenta Massachusetts. Parolis d-ro Gisela Macioszek pri sia loka Esperanto-grupo en Hamburgo. Ŝi menciis, ke en Hamburgo estas malgranda klubo kun "nur" 120 membroj, kiu posedas propran konstruaĵon. Ŝi taksis, ke estas entute 500-600 esperantistoj en Hamburgo. Oni diskutis kun d-ro Macioszek la diferencojn inter Usono kaj Eŭropo rilate al la ĝenerala akceptado de Esperanto. (raportis Jerry Veit) Sud-Novanglia E-o-Societo, 446 S. Quaker Lane, West Hartford, CT 06110,

tel. (203) 231-1944

ILLINOIS

Jaŭdon la 14an de novembro, 1991, okazis akcepto kaj programo pri la klerigaj kaj sociologiaj bonfaraĵoj de Esperanto kiel fremda lingvo en la Publikaj Lernejoj de Chicago. La programo, organizita de la Fako pri Lingva kaj Kultura Klerigado de la Publikaj Lernejoj de Chicago, enhavis prezentojn de d-ro Howard Aronson, lingvisto ĉe la Universitato de Chicago, d-ro Ronald Glossop, Profesoro ĉe Sudilinojsa Universitato (Edwardsville), kaj s-ro Seymour Rubens, Estro de la Alcott-lernejo en Chicago, kie jam okazas programo pri Esperanto kiel Dua Lingvo. (raportis Ron Glossop)

La Eduka Komitato de la Esperanto-Societo de Chicago anoncas, ke okazos unusemajna Esperanto-kurso, por kredito, ĉe la ĉefsidejo de la Publika Lernejsistemo de Chicago de la 22a ĝis la 26a de junio. Ĝin prirespondecos la Sudilinojsa Universitato (Edwardsville). (raportis R. Kent Jones) Chicago E-o Soc., 5048 N. Marine Dr. #D-6, Chicago, IL 60640, tel. (312) 271-8673

NEW YORK

En aŭtuno de 1991, Nov-Jorko estis inundita de germanoj! Unue vizitis Evelina Kopycziok el Stuttgart. Evelina estas okulkuracistino kiu naskiĝis en Pollando sed nun loĝas kaj laboras en Germanio. Ŝi venis al Usono por konferenco kaj gastis ĉe Nancee kaj Jim Medrano dum ses tagoj. Pluvan nokton dum la vizito de Evelina, kvar malsekaj germanoj aperis ĉe la pordo de ges-roj Medrano. Unu el ili, Ines Exner el Freiberg, estis esperantistino. La grupo pasigis kvin semajnojn tendumante tra Usono. Ili petis gastigadon post kiam ili lernis, ke ne estas eble tendumi en la urbo Nov-Jorko. Ĉar jam estis gasto ĉe ges-roj Medrano, la gastigadon ili dividis kun Tom Eccardt. (raportis Nancee Medrano en *Novjorka Prismo*, okt. 1991) Esperanto-Societo de Nov-Jorko, c/o UEA, 777 UN Plaza, New York NY 10017

Daŭrligo sur paĝo 13

EL LA CENTRA OFICEJO

ĈU LA ANGLA AŬ ESPERANTO? (1)

Se usona esperantisto fariĝas pesimisma pri la estonteco de Esperanto, unu el la plej oftaj kialoj verŝajne estas la forto de la angla nun. Laŭ la informo kiun ni ricevas de usonaj amaskomunikiloj, oni povus supozi ke ĉiuj homoj en la tuta mondo aŭ parolas aŭ studas la anglan. Sed usonaj esperantistoj rajtas esti optimismaj pri la estonteco de Esperanto, kiel mi klarigos.

Unu el la celoj de *ELNA Update* estas klarigi kial la angla ne taŭgus kiel la unusola internacia komunikilo. Preskaŭ ĉiu numero de *ELNA Update* enhavas ekzemplojn de misuzoj de la angla fare de nedenskaj parolantoj. Ĉu en Eŭropo, Azio, Afriko, oni ofte skribas aŭ parolas tute fuŝan anglan. En reklamoj kaj eĉ gazetartikoloj abundas gramatikaj eraroj, misuzoj de vortoj, longaj frazoj tute nekompreneblaj, ktp. Fakte tiaj eraroj estas tiel frapaj ke usonaj gazetoj kaj ĵurnaloj ofte citas ekzemplojn de "fuŝangla" por amuzi siajn legantojn.

Alia problemo estas la ebla dialektiĝo de la angla. Kiel Pierre Ullman eksplikis en prelego ĉe la jara konferenco de la Modern

Languages Association (dec. 1991), eĉ en ekskolonioj de Anglio oni ne ĉiam parolas la reĝan anglan. Por doni nur unu ekzemplon, en Hindio ĵurnalistoj donas pluralon al substantivoj kiuj, laŭ gramatikoj, ne havas pluralon, kaj la vortuzo en artikoloj estas nekutima kaj kontraŭa al la lingvosento de denaska parolanto.

Samtempe la rolo de la angla malkreskas en aliaj ekskolonioj. En Niĝerio, ekzemple, oni baldaŭ instruos en indiĝenaj lingvoj, ne la angla; en la Filipinoj la angla fariĝas malpli uzata pro la kreskanta influo de la tagaloga.

Se la angla perdas influon en anglaj ekskolonioj, kiopri aliaj landoj, kie la angla neniam estis nacia lingvo? En Eŭropo, ekzemple, oficialaj enketoj montris ke malmulte da eŭropanoj scipovas la anglan, malgraŭ la fanfaronoj de anglaj kaj usonaj amaskomunikiloj. Se la nombro de eŭropanaj scipovantoj estas tiel malgranda, ĉu la situacio povas esti pli bona en malpli riĉaj landoj, kie mankas rimedoj kaj instruistoj?

Parolantoj de aliaj vaste parolataj lingvoj ŝajne ne opinias ke la angla estas la plej bona, aŭ la sola, kandidato por internacia komunikilo. Post la unuiĝo de Germanio, la germana fariĝis la plej parolata lingvo en la Eŭropa Komunumo. Germanio ankaŭ deziras ke ĝia lingvo fariĝu egala al la angla kaj franca en oficialaj paroladoj kaj dokumentoj. Cetere en orienta Eŭropo la angla ne anstataŭis la rusan kiel la plej studata lingvo; tiun lokon nun okupas la germana. La graveco ankaŭ de la hispana kaj japana kreskas, por menciigi nur du aliajn lingvojn.

Jen nur kelkaj ekzemploj kial la angla ne povos fariĝi la unusola internacia komunikilo uzota de ĉiuj. Eble vi samopinias, eble ne. La temo estas senfine pridiskutebla, sed nur la estonteco montros, kiu pravos—subtenantoj de la angla aŭ esperantistoj.

En venonta artikolo mi eksplikos kial, kvankam ni ja povas esti optimismaj ke Esperanto fariĝos la vera internacia lingvo, optimismo ne sufiĉas.

Mike Donohoo, Direktoro C.O.

ELNA NATIONAL CONFERENCE

Berkeley, CA, 18-23 July 1992

Berkeley means ...

• *The University of California at Berkeley*, one of the largest and most prestigious universities in the world. Esperanto has been taught at Berkeley for some seven years now, through the DECal (Democratic Education at Cal) program and under the sponsorship of the Chairman of the Department of Linguistics. ELNA will be holding its Conference on university property, just north of the University proper.

• *The Lawrence Hall of Science and The Exploratorium*. These will be of interest particularly to the younger members of ELNA who like to get their hands on science experiments. The second is in San Francisco, just across the bay from Berkeley; the first is just up the hill from the ELNA Conference.

• *Telegraph Avenue*, perhaps the largest

Third-World bazaar in the Western World, with blocks of tables where the street people sell their handicrafts. Telegraph avenue is also a Mecca for the bibliophile, with such famous bookstores as Cody's, Moe's and Shakespeare. For myself, I'm a devotee of *The Other Change of Hobbit* (science-fiction and fantasy) and *Shamballah* (esoterica).

• *East Bay Regional Park District*. The folks of Berkeley and its surrounding cities long ago decided to keep much of their surroundings pristine and natural, and today thousands of acres of the hills behind Berkeley are preserved as parks, easily accessible from the city but free of its noise and hubbub. Though not part of this District, other wild regions in nearby Marin county such as Muir Woods National Monument, Mt. Tamalpais State Park, the Golden Gate National Recreation Area and Point Reyes National Seashore also deserve mention.

• *Napa Valley wine country*. A daytime


excursion to this beautiful green valley lying between low wooded hills, with its multitude of vineyards and wine cellars, is a must. But if you don't take the excursion train, be sure you have a designated driver...

• *Cool (not cold) nights and warm (not hot) days*. In the summer Berkeley is kept cool by the same late afternoon and nighttime sea-breeze and fog that dominate San Francisco State University; but in Berkeley the fog usually burns off at about the hour that you get up in the morning. On the other hand, since it is next to the Bay Berkeley never gets as hot as the inland valleys of California.

• *The ELNA Central Office*. Located in Emeryville, just south of Berkeley, the C.O. is the center of Esperanto activity in the United States.

Those of us in the Bay Area hope to see you out here among us this summer. We think you'll enjoy your visit!

Don Harlow



ANONCOJ

La rubriko Anoncoj enhavas diversajn reklametojn, petojn, ktp., kiuj estas diskonigindaj sed ne povas trovi lokon en alia rubriko. Nek ELNA nek la redaktoro povas promesi aŭ prirespondecigi definitivajn plenumon de io ajn promesita en anonco.]

Juna geedza duopo en Ĉeĥoslovakio intencas vojaĝi en Usono dum ses monatoj de 1992 kaj serĉas laboron por parte subteni ilian vojaĝon. Por informoj kaj kun proponoj: **Martina kaj Aleš Foldynovi, Koblavská 282, CS-725 29 OSTRAVA-PETROVICE, Ĉeĥoslovakio.**

Darlene Evans has donated a copy the first edition of A. A. Milne's *Winnie-La-Pu* (Esperanto translation of *Winnie The Pooh*) to the Nebraska Internacilingva Asocio. The N.I.A. will be holding a **drawing for the book** at its Celebration of Esperanto weekend in October. The winner does not need to be present to win. All proceeds will be given to Children Around the World following the October drawing. For each chance in the drawing, send a 3 x 5 card with your name, address and phone number and a donation of \$5 to: **N.I.A., R.F.D. 1 Box 29, Wilber NE 68465.**

Edward Symoens de la **ILEI pretigas studojn pri la jenaj temoj**: Universitataj kaj alternejaj disertacioj aŭ diplomverkoj rilate al Esperanto aŭ interlingvistiko; La propedeŭtika valoro de Esperanto; La problemo de la natureco kaj artefariteco de lingvoj; La naciaj influoj en Esperanto. Kiu estas preta kaj kompetenta kunlabori aŭ proponi informojn pri tiuj temoj, tiu bonvolu kontakti: **Edward Symoens, Putsesteenweg 151, B-2180 KALMTHOUT, Belgio.**

Diversaj aspektoj de la belega lando Kolombio, "Pordo de Sudameriko", estas havebla **en luksa 18-poŝtkarta ujo, "Mirinda Kolombio"**, kun tekstoj en la Esperanto-lingvo, kontraŭ 10 usonaj dolaroj. Mendu de: **Luis Felipe Baldarriaga, Poŝtkesto 5567, MEDELLIN, Kolombio.**

Geanoj de Esperanto-Klubo en Košice,

kiuj en la jaro 1994 festos 70-an datrevenon de ĝia fondiĝo, **serĉas Esperanto-klubon en Usono**, por celo de ĝemelaj kontaktoj. Proponojn sendu al adreso: **Dušan KAFKA, Karpatská 1, 04001 KOŠICE, Ĉeĥoslovakio.**

Kiel ĉiujare, ankaŭ en 1992 la esperantista Kastelo Grésillon ĉe la bela Valo Loire de Francio aranĝas **plenan kaj interesan serion da unusemajnaj kaj plursemajnaj kunvenoj**, kaj por infanoj kaj por plenkreskuloj. Oni povas ricevi programon kun listo de kunvenoj kaj prezoj, sendante koverton kaj Internacian Respondkuponon al: **Kultura Esperanto-Domo Grésillon, F-49150 BAUGÉ, Francio.**

La **Letero de la Akademio de Esperanto** estas nun abonebla en Usono. La kosto por kvar sinsekvaj numeroj sendotaj aerpoŝte el Francio estas \$20.00. Peranto: **Eldonejo Bero, P.O. Box 13492, BERKELEY CA 94701.**

Eŭropa esperantisto deziras fondi **Esperantolingvan asocion pri NIFologio**. Por informoj, sendu Internacian Respondkuponon al: **PÁRTAY Dénes, H-7400 KAPOSVÁR, Damjanich u. 1/ I. 3/2., Hungario.**

Pro pasintjaraj sukcesoj, oni organizos dum la venonta somero **internacian semajnon kiu okazos ĉe mediteranea marbordo**, en havenurbo Sete, 30 km okcidente de Montpellier, en bela parko apud la maro, de la 12a ĝis la 19a de septembro 1992. Okazos tri nivelajn kursojn gvidatajn de eminentaj geinstruistoj, inter kiuj Pierre Babin. Por informoj kaj aliĝo: **Centre Culturel Esperanto de Montpellier, 5 rue du Docteur Roux, F-34000 MONTPELLIER, Francio.**

Por 13-16-jaraj gejunuloj, la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) invitas vin partopreni en **Internacia Somera Gimnazio Semajno**, 1-7an de aŭgusto 1992, en Bratislava, Ĉeĥoslovakio. El tiuj, kiuj sendos aliĝilojn, ILEI elektos 20 por partopreni. Tarifojn kaj aliĝilojn oni povas peti de: **s-ino Barcsay Zsuzsa, Bem rakpart 25/B, H-**

1011 BUDAPEST, Hungario.

Du esperantistaj entreprenistoj ĵus ekfunkciigis librovendejon kaj eldonejon en Seulo, kaj **serĉas libristan peranton aŭ partneron en Usono** pri librovendado, gazetoservado, ks. Ĵus aperis nova serio de belaj priEsp-aj poŝtkartoj. Kontakto: **S-ro LEE Jung-kee, PK 3047, SEULO, Sudkoreio, fakso (02) 752-2831, telefono (02) 752-2890.**

La Eduka Komitato de la Esperanto-Societo de Chicago aranĝas **Edukan Esperanto-Rondvojaĝon en Eŭropo** de la 14a de julio ĝis la 2a de aŭgusto, 1992. La Rondvojaĝo enkludos vizitojn al Kastelo Grésillon en Francio, la Kultura Esperanto-Centro en La Chaux-de-Fonds, Svislando, kaj la Universala Kongreso en Vieno. Por informoj: **R. Kent Jones, Educ. Committee, Esperanto Society of Chicago, Apt. D-6, 5048 North Marine Drive, Chicago IL 60640, tel. (312) 271-8673.**

Bulgara Esperanto-Asocio kaj Kooperativo de Literatura Foiro bonvenigas al la **11a Internacia Literatura Forumo** en Vraca, Bulgario, de la 27a de junio ĝis la 2a de julio, 1992. La kotizo, inkluzivante nur la programon, estas 20 usonaj dolaroj (por membroj de LF-koop: 12). Por informoj: **Kooperativo de Literatura Foiro, cp 303, CH-1008 PRILLY, Svislando.**

Inter la 27a kaj la 31a de julio 1992 okazos kunveno de la **Internacia Paco-Esplora Asocio** en Oosaka, Japanio. Oni invitas ankaŭ usonajn esperantistojn-pacostudentojn partopreni ĝin. Por informoj, kontaktiĝu kun: **Toŝio Terajima, Nisikuzyo 5-3-30-301, Konohana-ku, OOSAKA-si, 554 Japanio.**

La **26a Internacia Konferenco de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj** okazos en la Domo de Konstruistoj, Bratislavo, Slovakio, 1an ĝis 7an de aŭgusto 1992, tuj post la UK en Vieno (grupvojaĝo de Vieno al Bratislavo estos organizita). Kotizo (340 NLG, proks. \$200 ĝis 31a de marto) kovras loĝigon en du-lita ĉambro, tri manĝojn tage kaj la programon, kiu enkludos ankaŭ Cseh-Seminarion. Por informoj kaj aliĝilo: **Bertil Andreasson, Södra rörum pl. 455, S-242 94 HORBY, Svedio.**

ELNA KAJ EANA: FONDO KAJ MALFONDO

de David B. Richardson

[David B. Richardson, kiu estis membro kaj Subtenanto de EANA kaj kiu dum multaj jaroj ludas gravan rolon en ELNA, ankaŭ kiel ĝia Prezidanto dum pluraj jaroj, estas hodiaŭ plej konata kiel verkinto de la furora Esperanto • Learning and Using the International Language. En ĉi tiu artikolo li klarigas la fortojn, kiuj okazigis la displitiĝon de la malnova Esperanto-Asocio de Norda Ameriko kaj la fondon de ELNA.]

La organizita Esperanto-movado en Usono komenciĝis en 1905 kun la fondo, en Bostono, de Amerika Esperanto-Asocio. En 1908 AEA kuniĝis kun kelkaj aliaj "naciaj" grupoj en Usono kaj Kanado por formi unu solan Esperanto-Asociacion de Norda Ameriko. Dum ĉirkaŭ 40 jaroj EANA funkciis kiel centra apoga organizaĵo, kies sola laŭstatuta celo estis antaŭenigi la studon kaj uzon de Esperanto.

En 1944 EANA bezonis novan redaktoron por sia oficiala organo *Amerika Esperantisto*. En la numero por Marto-Aprilo, tiama prezidanto d-ro Cecil Stockard anoncis la ekfunkcion en tiu posteno de George Alan Connor. Connor estis instruisto de manlaboraj metioj en la publikaj lernejoj de Novjorko, kiu bone konis la presan kaj publicistan artojn.

Kiel junulo, Connor iom vojaĝis tra la mondo, inkluzive viziton al Sovetunio, en tempo, kiam ties ankoraŭ juna "granda socia eksperimento" tiklis la intereson de multaj personoj en la okcidento. Liaj spertoj tie tiom negative impresis, tamen, ke lia politika vidpunkto koloriĝis per vivlonga kaj arda kontraŭkomunismo.

Estas interese, ke d-ro Stockard trovis dezirinde inkluzivi en sia anonco precizan deklaron, *subskribitan* de s-ro Connor, kun la titolo NEK POR NEK KONTRAŬ IU AŬ IO KROM ESPEARANTO. "La celo kaj politiko de *Amerika Esperantisto*," ĝi tekstis, "estos antaŭenigi Esperanton, kaj en ĉio alia severa neŭtraleco estos observata." En julio, d-ro Stockard (okulisto en Florido) vizitis ges-rojn Connor en Novjorko. Stockard poste raportis en AE, ke en konversacioj kun Connor "plej grava punkto estas, ke EANA kaj AE ekzistas nur por progresigi Esperanton kaj por

plirapidigi ĝian oficialan agnoskon kiel monda interlingvo. Tiu ĉi punkto estas substrekinda."

Pro la milito, EANA ne kongresis inter 1942 kaj 1946. En 1945 okazis perpoŝta balotado por novaj oficistoj. La kandidatojn (nur unu por ĉiu ofico) nomis la estrara komitato, "en neekzisto de kandidatiga komitato". Per tiu balotado s-ro Connor fariĝis ankaŭ ĝenerala sekretario de EANA.

Li enposteniĝis kun granda energio. Dum mallonga tempo li organizis efikan oficejon en sia novjorka apartamento; varbis teamon de talentaj volontulaj helpantoj; redaktis, parte mem verkis, kaj eldonigis la gravan inform- kaj lernolibron *Esperanto: the World Interlanguage*; starigis subtenan fonduson por financi seriozan reklamadon de Esperanto; triobligis la nombron da membroj; kaj dume publikigis, pli aŭ malpli regule, plaĉaspektan kaj interesan revuon.

Necesas rimarki, ke la Esperanto-movado estis ĵus eliranta el terure stagna periodo: la ekonomia krizo de la tridekaj jaroj preskaŭ mortbatis ĝin finance, dum la leviĝo de naciismoj transmare, kaj de izolismo enlande, prezentis plej malfekundan teron por semi internacisman idealon. Ke Esperanto travivis, ŝuldiĝis grandparte al la obstino de individuoj kun tre granda volforto, diversloke tra la lando, kiuj instruis kaj propagandis la lingvon, vendis librojn, prezentis radio-disaŭdigojn, ktp., ĉiu plimalpli laŭ sia propra iniciato.

Nun en 1947 s-ro Connor konsideris, ke por vere progresigi Esperanton, EANA devus ne nur ludi rolon apogan kaj koordinan en la movado, sed ke ĝi devus firme gvidi ĝin. Jam en la unua numero de AE por tiu jaro, li aludis al la neceso por "forta Centra Oficejo"—kun majuskloj—"kaj efikan organizaĵon". En la sekvanta numero li pledis por "nedividita subteno kaj lojaleco al EANA", por la unua fojo nomante ĝin la "unu oficiala" organizaĵo en Nordameriko, kaj plendante, ke "individuismaj 'institutoj', 'Fondaĵoj', 'Libro-Servoj' ktp. disipas niajn rimedojn kaj inklinigas al malharmonio."

En la tria numero por tiu jaro li dediĉis apartan artikolon al plendo pri regiona Esperanto-grupo sur la Pacifika mar-

bordo, kiu, kun sia propra bulteno kaj libro-servo, "en realeco estas klopodo *dispartigi* nian Nordamerikan movadon". Li asertis, ke la "oficiala movado ne povas rajtigi dividon de la teritorio de EANA", kaj instigis "ĉiujn lojalajn kaj respondecajn esperantistojn... subteni la Centran Oficejon, aĉeti siajn librojn tra la Centra Oficejo, sendi siajn novaĵojn al AE, kaj ignori privatajn entreprenojn kiuj volus profiti el la laboroj kaj sindonado de via oficiala organizaĵo—EANA."

Tiel estiĝis la konflikto inter s-ro Connor kaj la "fortaj individuistoj" kiuj estis, ĝis signifa grado, la tradiciaj antaŭenigantoj de Esperanto en Nordameriko.

En la tuta 1948 ne aperis AE. Membroj ricevis "kompense" ekzempleron de *Esperanto: the World Interlanguage*. AE reaperis en 1949 kun ripetataj postuloj por "organiza disciplino" anstataŭ la "senrespondeca anarkio" de sendependaj entreprenoj. Ekde 1950, la enhav-paĝo portis regulan averton, ke EANA, kiel "laŭleĝa instanco" por Esperanto en Nordameriko, "ne respondecas" pri projektoj kaj eldonaĵoj, kiujn ĝi ne "rajtigis".

Ankaŭ en 1950 AE por la unua fojo sugestis, ke politika neŭtraleco, kiun devigis al EANA sia statuto, ne estis absoluta. En artikolo kun la titolo "'Interna Ideo' kaj 'Neŭtraleco'", Prezidanto William Solzbacher diskutis kreskantajn kritikojn, ke EANA forlasadis ambaŭ. "Kiam Esperanto estas uzata por disvastigi evidentajn mensogojn aŭ por subfosi la demokratian konstitucion kaj la liberecon de nia lando," li skribis, aludante ferkurtenajn landojn, kiuj eldonis en Esperanto kontraŭ-usonon propagandon, "nia 'neŭtraleco' tute ne devigas nin toleri tion senproteste".

Dume, signifa nombro da membroj, malkontentaj pri tio, ke s-ro Connor—laŭ ili—volis "diktatori" ĉion kaj ĉiun en la Esperanto-movado, iniciatis kampanjon forigi lin el la posteno de Ĝenerala Sekretario en la venontjara balotado. Tiu iniciato fiaskis meze de plendegoj, ke ŝanĝoj en la balotada regularo certigis rezulton favoran al Connor kaj liaj kunuloj.

En AE por septembro-oktobro 1951,

EANA nete kaj definitive reĵetis la neŭtralismon. En artikolo titolita "Ni Elektas Liberecon", Connor asertis (sen kiuj ajn pruvoj), ke "Komunistoj ... penas enpenetri en la 'neŭtralajn' Esperanto-organizaĵojn por ... komunistigi ilin per la jam konata metodo de 'borado de interne'". Avertante pri "trompisto inter ni" kiuj kaŭzas "malfacilaĵojn ... per ruza kaj 'ruĝa' agado", li deklaris, ke EANA ne povas esti neŭtrala "inter la bono kaj la malbono, demokratieco kaj la absolutismo, libereco kaj sklavigo, Ameriko kaj la Soveta Unio".

Pluraj tiaspecaj artikoloj (inkluzive aparte vitriolajn atakojn kontraŭ Teo Jung, la respektata eldonisto de *Heroldo de Esperanto*) aperis en AE ekde tiu tempo, plimalpli subtile ŝajnigante kunligon inter la supozata komploto komunistigi la Esperanto-movadon, kaj kreskanta grupo da membroj, kiuj insistis je forigo de Connor kaj reorganizo de EANA.

Cu inter tiu opozicio troviĝis eĉ unu vera komunisto estas duba, kaj Connor neniu akuzis rekte, sed skribis kaj parolis en ĉirkaŭfrazoj pri "la kamaradoj", "komunistemaj konvinkoj", kaj pri "persone ambiciaj kaj/aŭ ekstreme radikalaj individuoj" ktp.

Frue en 1952 Connor postulis en la paĝoj de AE, ke "membroj de EANA akordiĝu kun ĝenerale akceptitaj principoj de Nord-Ameriko (kiuj) ne inkluzivas komunistan sklavigon" kaj iom ĉifre rebatis ies plendon, ke "ni ne povas rifuzi membrecon al komunistoj". La klarigo estas, ke en tiu jaro gvidantaj personoj en la opozicio trovis sin efike eksigitaj el EANA, kiam iliaj realiĝaj kotizoj estis tutsimple rifuzitaj kaj resenditaj.

Opozicianoj nun perdis ĉiun esperon reorganizi EANA-n de interne, kaj starigis grupon por ekplani novan asocion, kio kulminis en fondiĝo de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko antaŭ la fino de tiu jaro.

ELNA rapide establiĝis kun kreskanta membraro kaj regule aperanta revuo, kun responda malkresko en la membronombro kaj financoj de EANA. Kiam ELNA faris peton al UEA pri agnosko kiel oficiala landasocio por Norda Ameriko, paralele kun EANA, la Komitato de UEA pretiĝis konsideri ĝin dum la Universala Kongreso en Haarlem, Nederlando, en 1954. S-ro Connor estis ano de tiu Komitato. Membroj de EANA faris monkolekton por certigi, ke li povu

ĉeesti la kunsidojn.

La decido de la Komitato estis, ke EANA bonfide klopodu restarigi unuecon en la nordamerika movado ĝis la fino de la jaro; kaj en kazo de malsukceso, la Komitato rekonsideru la peton de ELNA en Bologna, Italujo, en 1955.

Reveninte de la Kongreso, ges-roj Connor raportis en AE pri antaŭ- kaj post-kongresaj ekskursoj, pri bela sunbrilo kaj gaja etoso, pri festparoladoj kaj la prezo de buterpano en Haarlem, sed neniu vorton pri la komitata decido. Neniu klopodoj restarigi unuecon okazis, kaj ĉe la UK en Bologna en 1955 ELNA estis agnoskita kiel oficiala landasocio paralele kun EANA.

AE por julio-oktobro, 1955, respondis al tio per longa atako kontraŭ UEA kaj ties "nuna potenculo" (d-ro Ivo Lapenna), akuzante ilin pri "absolutismo", "apogo de la maldekstra flanko de nia movado", pri diversspecaj intrigoj, kontraŭstatutaj agadoj ktp. Eĉ pli venenaj akuzoj kontraŭ UEA kaj Lapenna aperadis en postaj numeroj. Kiel rezulto de tiaj atakoj, la Komitato voĉdonis eksigi s-ro'n Connor el UEA. Tiu rara, preskaŭ senprecedenca ago estis apelacita kaj konfirmata per granda plimulto da voĉoj ĉe la UK en Kopenhago en 1956.

La Komitato ankoraŭ diskutadis, ĉu forigi ankaŭ EANA-n el UEA, sed tiun demandon findecidis la estraro de EANA mem per memvola ekŝigo.

AE aperadis post tio kun eĉ pli da artikoloj remaĉantaj la temojn de komunismaj intrigoj en- kaj eksterlande, ĝis 1958, kiam la eldono fariĝis neregula, kaj 1959, kiam ĝi tute ne aperis. En tiu jaro grupo de esperantistoj el ambaŭ partioj formiĝis por studi eblecojn reunuigi la du organizaĵojn. La Kongreso de ELNA en St. Louis aprobis la klopodon, nur insistante pri "politika kaj religia neŭtraleco kaj interna demokratieco" en nove reunuigita asocio. AE (reaperanta neregule en 1960) nomis la klopodon "ruzaĵo de radikalaj ruzuloj" kaj deklaris, ke "unueco restas en tio", ke "ne-radikalaj esperantistoj" aliĝu al EANA, kaj "la ribelaj elementoj (en ELNA) reiru al SAT kaj maldekstraj partioj sub la ruĝa standardo, de kie ili devenis".

Post majo, 1961, okazis nova interrompo en la eldonado de AE. Kiam ĝi reaperis en septembro, 1963, ĝi havis novan adreson en Portlando (Oregonio), kien ges-roj Connor dume transloĝiĝis.

La revuo eliris pli kaj pli neregule. La lasta numero aperis en 1967 post kiam EANA mem praktike ĉesis ekzisti. George Alan Connor mortis en 1973.

Daŭrigo de paĝo 3

a newsnote in *The Modern Language Journal* (1991(75)). The note gives a figure of 2,000,00 for the number of speakers of Esperanto and describes its origin. (sent by Humphrey Tonkin)

A limited-edition pamphlet proposing the establishment of a 51st State of Art in southern Utah lists the state's official language as Esperanto, and gives ELNA's address for information. (sent by Bob Matheny)

Don Hauptmann's new book *Cruel and Unusual Puns* (Dell, 1991) mentions the existence of transposition puns in Esperanto, and quotes an example from Dr. E. James Lieberman. (reported by Jim Lieberman)

The 1991-1992 edition of the *ASUC Student Directory* (University of California, Berkeley) includes a description of the new student Berkeley Esperanto League—"promotes the awareness, teaching, learning and usage of the intercultural and world language—ESPERANTO—as a linguistic tool for intercultural and world communication." (provided by Ionel Onet)

While we don't usually mention articles from the Esperanto press, this one is too good to pass up. An article "Plej popularaj Esperanto-gazetoj" by one "StiNk" in *Tutmonda Ĵurnalisti* not only talks about Mike Donohoo's discussion of the most popular Esperanto magazines in a recent edition of *EUSA*, but also says of Nikolai Stepanov's article about Esperanto in the USSR that "the contents of the article have already been reprinted in English by many American newspapers and the Executive Board of UEA discussed it during a special *closed* (secret) meeting during the 76th UK in Bergen, Norway. But to compensate (it is said) the publication quantity of *Esperanto USA* has suddenly doubled." This is all news to us... (pointed out by Ionel Onet)

JOHN STARLING

Kiam, kie kaj kial vi lernis Esperanton?

Ekde mia juneco mi tre ŝatis legi sciencfikciajn romanojn. Kaj en tiaj romanoj, estas kutime, ke aŭtoro menciui interplanedan aŭ galaksian lingvon, por ke la diversaj uloj de la verko povu konversacii inter si. La nomoj de tiu lingvo tre varias, sed foje oni legas pri Esperanto. Sur la lasta paĝo de unu romano mi trovis la iom ŝokan informon, ke Esperanto fakte estas lingvo vivanta. Mirinda novaĵo! Mi tre surpriziĝis.

Jam ekde la infaneco mi volis lerni duan lingvon, eble plurajn. Sed ĉiuj el miaj antaŭaj lernoprovoj fiaskis. Mi studis kaj studis, sed progresis senkontentige. Mi tiel gajnis nek bonan komprenon nek fluecon pro la kapricaj reguloj de ĝiaj memkontraŭaj gramatikoj. Post ĉiu malsukceso, mi hontis pro mia stulteco. Fine mi ekkredis, ke al mi la kapablo por lerni lingvojn eble mankas. Sed nu! Jen nova lingvo, kiu promesas tute logikan gramatikon. Kia bonaĵo! Lingvo tia nepre lemdindas. Eble eĉ mi povos lerni ĝin. La paĝo montris la adreson de ELNA. Mi tuj petis pluan informon per letero. Tio estis en la printempo de 1983, en mia hejmurbo, Kalamazuo Miŝigano. Ŝajne la promesoj pri Esperanto pravis, ĉar mi nun tre bone komprenas ĝin, kaj ne plu hontas pro lingvolema malkapablo.

Kiu estas la kampo, en kiu vi plej laboras por Esperanto, kian laboron vi faras en tiu kampo, kaj kial vi opinias tiun kampon aparte grava?

Mi nun laboras traduki sciencfikcian romanon, akirinte kontrakton kun Walter Jon Williams, la fama Usona aŭtoro de *Hardwired* kaj *Voice of the Whirlwind*. La kontrakto rajtigis min, ke mi presu ambaŭ librojn po kvin mil ekzempleroj sen pagi procenton. Anstataŭe, mi pagas nur dek dolarojn monate ĝis tiam, kiam mi finfine plenumos la projekton, kiom ajn longe tio prenos.

Tiuj du romanoj estas duopa serio el tiu sciencfikcia subspeco, kiun oni nomas cibernetik-punkaĵo, kiu, laŭ mia ĝisnuna sperto, tute ne koniĝas en Esperantujo. Ĝi probable estas la plej moderna el ĉiuj

modernaj verkstiloj. Tio gravas! Kiu vere volas legi Ŝekspiron? Preskaŭ neniu. El tiuj, kiuj aĉetas klasikaĵon, treege malmultaj fakte legas ĝin ĝis la fino. Ĉu tio efikas? Ĉu tio antaŭenigas la movadon? Tute ne! Esperanto bezonas la plej novajn, modernajn, interesajn romanojn. La klasikaĵoj de Esperanto nur kolektas polvon surbrete, same kiel la nacilingvaj.

Ĉu vi ne ofte aŭdis geesperantistojn diri, "Oni devas verki pli interesajn librojn"? Mi mem ofte diris ĝin. Sed kiu estas oni? Oni estas ni. Oni estas mi. Oni estas ankaŭ vi. Pli bone diru, "Mi verku pli interesan libron." Kaj se, kiel mi, vi ne ĝuas sufiĉe da talento por verki originalan romanon, traduku. Sed bonvolu, mi petas, ne traduku pluan klasikaĵon. Nur polvo atendas ĝin. Elektu ion modernan. Certe por vi ekzistas plej ŝatata libro. Tre surprizus min, se ĝi estus klasikaĵo. Komencu traduki ĝin nun. Ne prokrastu.

"Sed kopirajtoj protektas modernajn librojn! Kiel mi akiru la permeson?" vi demandas. Saĝa demando. Jen tiel, kiel mi mem sukcesis. Petegu la aŭtoron, aŭ lian agenton per letero. Ekspliku detale pri tio, kio Esperanto estas. Sed citu la plej malflatan kalkulon de ĝia parolantaro. Treege variaj "oficialaj" kalkuloj abundas. Por reklami Esperanton al varbotoj, elektu la plej flatan; sed por akiri kopirajton de aŭtoro, citu malflatan. Neniu vere konas la ĝustan nombron de esperantistoj; do vi ne povas mensogi per tia citado. Kaj krome, ĉiuj ni scias, ke Esperanta eldonado ja ne estas profitdona afero. Emfazu tiun ĉi malĝojigan fakton al la aŭtoro. Diru, ke neniu rajtas anticipi grandan profiton kontraŭ Esperanta tradukado. Informu lin, ke vi fakte atendas ekonomian perdeton. Certigu la aŭtoron pri viaj duboj rilate al ia ajn ebla profito. Diru al li, ke malgraŭ tio, ke la projekto ne povas doni profiton, tamen lia verko meritas tradukadon. Alivorte, informu lin pri la vero, ke vi tutkore volas honori lian geniecon per kelkvara laboro kontraŭ tute neniom da profito. Se tio ne plaĉos al li, nenio povas.


Kiu, laŭ vi, estas la plej granda problemo, kiun la Esperanto-movado en Usono nun

frontas?

Tio estas ĝia nerekonateco. La plimulto de usonanoj eĉ ne rekonas la nomon de nia lingvo. La movado en Usono preskaŭ nenie videblas. Kaj ELNA malmulte helpas je tio, krom en Kalifornio. La plej bona reklamilo estus daŭra, konstanta kaj senpaŭza videbleco. ELNA lasu la unuopan persvadon de varbotoj al ni, ĝiaj individuaj membroj. Sed ĝi ofertu al ni laboremulojn ĉiujn necesajn ilojn por ke ni tiel konstante reklamadu. La Centra Oficejo jam faris bonan komencon per la Informpeta Servo. Sed tio estas nur komenco. Jen kelkaj pluaj ideoj...

Mi mem desegnis, kaj per la propra mono aĉetis, tri grandajn ŝildojn, kiuj reklamas Esperanton per blankaj plastaj gluliteroj kaj verda stelo. Mi gluis ilin sur la nigrajn flankojn kaj malantaŭon de la propra kamioneto. Centoj da homoj vidas ilin ĉiutage. ELNA faru same: ĝi aĉetu tiajn ŝildojn kaj revendu ilin malmultakoste, eĉ malprofite. Kelkopa aĉeto kostos malpli multe ol unuopa. Se kelkaj membroj volas proponi la surfacon de sia propra aŭto kiel ŝildlokon, kial ELNA ne provizu ŝildon? Imagu, se nur dek aŭtoj portus tiajn ŝildojn diversloke en Usono, kiom da antaŭe neinformitaj usonanoj tiel lernus rekoni almenaŭ la nomon de Esperanto? ELNA provizu ankaŭ komercajn kartetojn, kaj afiŝojn. Decas, ke ELNA celu ankaŭ la tuton de Usono, anstataŭ nur Kalifornion. Kaj kiel pagi? Pensu, kiom ni ŝparus, se la Centra Oficejo estus en Nebrasko (la centro de Usono), anstataŭ en multekostega Kalifornio.

Sed mi ja ne atendas, ke tio baldaŭ okazos. Sed ELNA almenaŭ mendu konton ĉe la tutmonda komputatora interligo *CompuServe* por la Centra Oficejo. Tio ne multe kostos. Kaj per tio ĝi povus komuniki kun kelkaj jam ekzistantaj Esperantaj retoj tutmondaj. La UEA eĉ nun pripensas fari ĝuste tion. Se ambaŭ farus tion, ili povus pritrakti iun ajn problemon en nur unu sola tago, anstataŭ atendi dum la intersendado de kelkaj leteroj. Tio efike plicentrigus la Centran Oficejon almenaŭ laŭ la komunikado, se ne laŭ geografio.



LETEROJ

[Note: The letter column is a free-speech forum for members of ELNA. Views expressed are not necessarily those either of the editor or of the Esperanto League for North America, Inc. Comments for publication may be sent either to the address of ELNA or to Don Harlow (EUSA), P.O. Box 551, Pinole, CA 94564.]

[Ankoraŭ pri korespondado...]

Dank' al Viakora helpo mi tamen trovis literamikojn el Usono.

DANKEGON!

Mi deziras al Vi kaj ĉiuj amerikanoj SANON, FELIĈON, PROSPERON.

Helen Avdick
USSR

[Kaj mian dankegon al tiuj, kiuj elektis skribi al s-ino Avdick!]

Mi estas la estro de grupo de armeaj programistoj (majoro). Dum mia militservo mi povis nur legi Esperantan literaturon. Korespondado kaj renkontoj kun alilandanoj estis neblaj.

Sed julie mi fariĝis UEA-ano. Kaj nun, post grandegaj eventoj en mia lando, kiuj estas bone konataj al vi, miaj insistaj petoj pri demisio el la armeo estos kontentigitaj. Tial, mi petus vin laŭeble helpi min ricevi laboron en mia nova civila vivo.

Mi estas 37-jara. Mia programa sperto estas 18 jaroj. Mi laboris kun diversklasaj komputiloj en la sfero de sistema programado. Mi kreis kompilerojn, drajverojn, aplikajn programojn k.t.p.

Mi parolas angle, kvankam ne bone pro tio, ke mi ne havis praktikon. Mi povos labori en Moskvo (mia urbeto situas proksime). Mi povus esti reprezentanto de ia firmao; labori kiel programisto; krei filion de ia programada firmao, kiu uzus malmultekostajn laborfortojn k.s. Certe, mi, kiel sovetlandano, ne scias multajn eblecojn. Povas esti, vi havas proponojn?

Vladimir Boĉkarjov
Dementjeva 15-35
SU-141170 MONINO
Moskovskoj obl.
Rusio

[Ĉu iu povas proponi konsilojn aŭ eblecojn al majoro Boĉkarjov?]

La 22-an de septembro fondiĝis la Sud-Novanglia Esperanto-Societo (Southern New England Esperanto Society), kiu

kunvenis ĉe la Universitato de Hartford en Connecticut. La fondiĝo estas plejparte rezulto de la Esperanto-kursoj, kiuj okazis ĉe la sama universitato ĉijare en aŭgusto. Entute dek unu personoj el la tuta ŝtato Connecticut kaj el najbaraj regionoj de okcidenta Massachusetts partoprenis nian unuan kunvenon. Aliaj personoj telefonis kaj promesis partopreni la venontajn kunvenojn en oktobro, novembro kaj decembro.

Ni intencas esti aktiva, internacieca loka grupo. Kiel komenca projekto, kaj por montri la tutmondecon de Esperanto, ni deziras fari letervesperon en marto aŭ aprilo de la nuna jaro. Ni do petas individuojn aŭ klubojn sendi al ni belajn bildkartojn el viaj urboj aŭ regionoj. Ni nepre respondos bildkarte al ĉiuj! Ni ankaŭ serĉas kontaktojn kun aliaj lokaj aŭ regionaj E-grupoj cele al kunlaboro, interŝanĝo de ideoj, ktp.

Ni estus tre dankaj al vi, se vi povus aperigi la suprajn informojn en venonta numero de *Esperanto U.S.A.* Dankon!

Jerry Veit
446 S. Quaker Lane
West Hartford, CT 06110
tel. (203) 231-1944

[Bona kaj imitinda ekzemplo por aliaj ankoraŭ nefonditaj lokaj aŭ regionaj grupoj...]

Mi ektrovis novan metodon por konatigi Esperanton. Nia loka bibliotek-sistemo (konsistanta el 23 bibliotekoj) starigis novan komputilan sistemon por trovi librojn. Oni povas tajpi aŭ titolon aŭ aŭtoron aŭ temon, kaj la komputil-ekrano montras la libro(j)n, kaj en kiu biblioteko ĝi/fili estas. Nun, kiam ajn mi estas en la biblioteko (proksimume du-trifoje semajne), mi tajpas la temon Esperanto, kaj la 12 titoloj (kelkaj kun du aŭ pli da ekzempleroj) montriĝas sur la ekranon. Sed anstataŭ blankigi la ekranon, mi lasas ĝin, por ke la sekvanta uzanto vidu ĝin. Eble iu vidos tion, kaj ekpensos "Esperanto? Mi kredis, ke tiu lingvo ne plu ekzistas. Sed estas multaj aktualaj libroj pri ĝi." Se via biblioteko havas ĉi tiun komputilan sistemon, provu la metodon. Kaj se la biblioteko ne havas multajn titolojn pri Esperanto, petu, ke ĝi aĉetu ilin.

Arlyn Kerr
[Kompreneble, helpas certigi, ke en la

sistemo troviĝu kelkaj aktualaj verkaĵoj ... ekzemple, Esperanto • Learning and Using the International Language de David B. Richardson ...]

After attending the San Francisco State University course back in 1983, I was sure that only one thing could possibly be better: a one-week Esperanto course, so that people who couldn't take the three weeks of vacation could still have a similar experience. I was mulling the idea over again a couple of years ago, considering Boston-area universities. Then my wife reminded me that Dr. Humphrey Tonkin had just become President of the University of Hartford. "That's close enough—and besides, it will attract New Yorkers as well as New Englanders then."

Dr. Tonkin liked the idea, and found excellent teachers for the course. Prof. John Wells is President of UEA and author of the Wells Dictionary. Prof. William Orr ("Prof. Vilĉjo") teaches mathematics at Hofstra University (and some Esperanto, but not too loudly). Also assisting were Dr. Tonkin and his wife, Prof. Jane Edwards.

People started arriving Sunday, August 12. We started at 9 AM Monday with orientation: two hours of classes in the morning (beginners and intermediates simultaneously), an hour for a presentation for both classes together, and two more hours of classes in the afternoon. Plus, of course, plenty of homework.

The presentations were held outside in the warm summer air. Prof. Wells or Tonkin spoke, about phonetics, the Esperanto movement, and UEA. And Dr. Tonkin led us through the University's Museum of American Political Life, a wonderful collection of buttons, cartoons, flyers, videotapes, and articles about politics and political campaigns in this country.

We also arranged some evening events. Since we didn't really have enough evenings for everything that we wanted to do, we combined two events for an Interkonatiĝa Pikniko on Monday. (Jerry Veit took care of the food and barbecuing. He also arranged a book service, so students could see the books and buy them.) Another evening we showed videotapes in and about Esperanto. And we had a Sapkesta Vespero, where anyone could expound upon any topic, for up to fifteen minutes. I spoke about the new Student Fund: helping students for future years. (If you want to help support students going to

this course, send a check to ESNE, PO Box 655, Concord MA 01742, payable to ESNE and marked "For U/H fund." A full tuition scholarship is \$195 for students taking the course non-credit, but any amounts are welcome.)

And when it was all over, how did people like it? Some comments from the survey forms about the instructors: "Prof. Orr was excellent. I did not imagine I could learn so much of a language so fast." "Ms. Tonkin has a special gift." "Marvelous. The best!" "The instructors are excellent! I was never able to learn as much from instructors of other languages as I learned in the span of a week."

And we'll certainly try to do the course again when we get comments like this: "It was all great!" "Ĉio estis bona." "Mi ŝatis ĉion." "I really enjoyed it!" "Ending this week is difficult—I want to come back! This is something I want to integrate into my life at all levels. Dankon por ĉio!" "Mi esperas ke la kursoj daŭros." "Bravo!"

My thanks to the many people who helped make this course happen, including Drs. Tonkin, Wells, Orr, and Edwards; Hilda Grossman, the Director of Summer Programs, who made sure that everything went smoothly; Jerry Veit and Bill Harris for helping; Cathy Schulze for supporting me and showing us the way; and Sally Lawton, Grace Cali, Donner Lohnes for their help and support.

David Wolff

[La du sekvantaj leteroj, de longtempaj esperantistoj kaj Honoraj Membroj de ELNA Armin F. Doneis Sr. kaj Roan Orloff Stone, rilatas ankaŭ al la artikolo de David Richardson en la nuna numero, kaj al la fondo de ELNA antaŭ 40 jaroj.]

Antaŭ 44 jaroj la Kongreso de la Esperanto-Asocio de Norda Ameriko okazis en Milwaukee, Wisconsin. Mi vigle helpis kun la aranĝoj, kaj dum tiu kongreso oni elektis min kasisto de EANA. Post la kongreso la tiama sekretario, J. J. Sussmuth, invitis min veni al la centra oficejo en Fort Lee, N.J., por esti lia helpanto. Dum tiu etapo mi bone observis la glatan funkciadon de EANA kaj ties centra oficejo, kaj ankaŭ intime konatiĝis kun la gesamideanoj en Novjorko.

Kelkajn jarojn poste, s-ro Sussmuth emeritiĝis, kaj oni elektis s-ron G. Alan Connor kiel sekretarion de EANA. S-ro Connor estis tre kompetenta esperantisto kaj vigla administranto, sed li jam

dekomenca pruviĝis diktatoreca, kaj ne volis toleri alies proponojn. Nur li mem havis la kompetentecon, kapablon kaj rajton fari kian ajn decidon. Do la demokrateca spirito en EANA forfuĝis. Fakte, por sekurigi sian decid-rajton pri kia ajn politiko en EANA, s-ro Connor eksigis multajn gesamideanojn el EANA per simpla neakcepto de ties kotiz-pagoj je la jarkomenco. Do multaj fideluloj staris ekster la usona movado, enrigardante tra la fendoj.

Sekve, antaŭ 40 jaroj la elpuŝitoj kunvenis en St. Louis kaj Madison, Wisconsin, por fondi la Esperanto-Ligon por Norda Ameriko, por daŭrigi la nacian kunlaboron, for de la Connor-influo. Inter tiuj kiuj helpis gvidi la laboron de la Ligo en la fruaj jaroj estis: Louis Dormont, Lewis Maury, Glenn Turner, Ferd Carlson, Mark Starr, John Lewine, D. E. Parrish, Chas. Chomette, Roan Orloff, Frank kaj Bonnie Helmuth, Tom Goldman, Jos. Leahy, Jos. Scherer, Isaac Horowitz, Fred A. Hamann, Ralph Bonesper, Conrad Fisher, Hyman Ledeen, David Richardson, Geo. Falgier, Adrian Hughes, Albert C. Runkel, Ray Pease, Philip Hahn, Oristo-Goldner, J. Regal, Armin Doneis, E. G. Dodge, kaj multaj aliaj fideluloj.

Post la fondo de la Ligo, EANA grade forvelkis. ELNA ekfloris kaj prosperis en sia fruktodona grandskala kunlaboro disvastigi kaj utiligi Esperanton en tre kontentiga kaj gratulinda maniero. Mi antaŭdiras brilan estontecon por nia Ligo, fare de nia diligenta kolegaro, kaj de la novaj adeptoj allogataj en ĉiam kreskantaj nombroj.

Armin F. Doneis Sr.

Bedaŭrinde mi ne ĉeestis la fondon de ELNA. Mi bone memoras tiun malagrablan tempon fare de Connor. Multaj el ni ne ŝatis lian—vi uzas la vorton diktatoreco, sed ja estis pli ol diktatoreco, estis ja tiraneco—li estis la Saddam Hussein de Esperantujo en Usono. Komencis esti flustroj pri disiĝo de EANA, multaj el ni ne ŝatis liajn farojn. Mi bone memoras, en la lastaj du kongresoj de EANA, mi pledis por unueco, ĉar mi ne ŝatas malamikecon, kaj mi volis, ke estu unu centra oficejo forta, al kiu ĉiuj membroj povus turni sin. Sed la flustroj pri disiĝo daŭris.

La sekvinta okazo estis, ke mi ricevis anoncon pri la fondo de ELNA, kaj ke la unua kongreso okazos en Middleton, Wisconsin, kie loĝis Glenn Turner, tre, tre

afabla kaj sindediĉa esperantisto. La fondo de ELNA okazis kvazaŭ sekrete. Nu, mi tuj aliĝis al ELNA.

Nu, post la fondo de ELNA, ni skribis al la UEA kaj petis membriĝon. La UEA ne volis havi DU membro-asociojn en la sama lando. Komence ili hezitis. Sed ELNA skribis al la UEA informojn pri la stato de Esperanto en Usono, kaj skribis al ili pri la veraj kaŭzoj de la disiĝo. Post iom pli da esploro, la UEA akceptis ELNA-n kiel membron kaj rifuzis membrecon al EANA.

Mi devas rakonti al vi pri tio, kion Connor provis fari al ELNA rilate al nia dua kongreso en Trenton. Gilbert Nickel aranĝis, ke la kongreso okazu ĉe la universitato Princeton. Du semajnojn antaŭ la kongreso, ĉiuj kongresantoj ricevis anoncon, ke la kongreso okazos en hotelo anstataŭe. Kiam ni atingis la hotelon, dum la unua malferma kunsido, ni informiĝis, ke Connor skribis al la prezidanto de Princeton, ke ELNA estas komunista organizaĵo.

Roan Orloff Stone

Interesas al mi legi viajn rimarkojn pri la aspekto de la redakta laboro rilate al EUSA, sed mi devas efi la legantojn, s-rojn Strumolo kaj Matt Harmon [n-ro 1991(6)—red.], kaj ne respondi kiel vi afable invitis kaj sendube ankoraŭ atendas; la vortoj de s-ro Harmon, kies profesio estas grafikartisto, ne plendas kontraŭ viaj stilo kaj gustumo en la kompostado kaj elekto de materialo. Mi mem estas pensiisto-ĵurnala kompostisto kaj nun redaktas monatan bultenon; kaj mi ankaŭ povas kritiki la kompostadan stilon, sed kiel jam dirite tia persona prefero ne apartenas al nia reala kampo en larondo de esperantistoj.

La raporto de Kohrs, Glossop, kaj via ĉefartikolo meritas nian atenton se ni esperas posedi fortan movadon. Sed, mia alloga intereso pri nia lingvo apartenas al la "tria kruro"; malfeliĉe, mi havas kapricideojn pri financaj aferoj, ankaŭ pri propaganda klopodo por subteni reton de lingvaj apelaciantoj. Alivorte, la kulturaj aferoj superas ĉion. Sed tio malhelpas la movadon kiam ajn oni adoptas tian ekstreman flankon. Pro tio, mi laŭdas la ELNA-bultenon pro la fakto, ke ĝi funkcias en aproba maniero por nia nacia instituto kaj vaste kontribuas al la internacia kampo. Mi ne povas koncepti, kiel oni argumentu kontraŭ la celo kaj agado de la bulteno kaj stabo de ELNA.

Se vi demandas, tamen, pri la persona

perspektivo de deziro kaj prefero anstataŭ praktika apliko de klubaj kaj naciaj interesoj, mi devas diri, ke Lanti [Eugène Adam, fondinto de Sennacieca Asocio Tutmonda—red.] meritas nian atenton. Supozu, ke ni ne havus financ-krizon en la organizaj aferoj. Do, en tia okazo ni povas senemfazigi lernadon kaj informvastigan rimedon, kaj adoptos la uzon de la lingvo kiel ĉefintereso sen la malinda distro de propaganda deforo!

Personoj ekster esperantistaro havas kredon, ke ni havas fontanon sed malhavas fonton! Kia eraro! La du bone verkitaĵoj de Reginald Jaderstrom montras, ke la kulturo Esperanta estas tre grava kaj havas en si naturan emon superi ĉiajn artefaritajn kaj kulturajn barilojn.

Mia revo, tial, estas la apero de ELNA Gazeto kies paĝoj multobliĝas al 36 paĝoj, kaj en kiu oni ne povas trovi eĉ unu vorton en la angla lingvo, escepte en la teknika senco kiam la diskuto kondukas al regionaj aferoj kaj la nomoj kaj terminaro postulas tiajn limigitajn klarigojn. Kaj, kiam la revoj en la Esperanta rondo ĉesas esti "unu-mondo", tiam estos agnoskita, ke ni gajnas venkon en la lingva batalo. Sed, "venko" ne estas la celo sur tiu grundo. Esperanto jam atingas nivelon akirindan, sed malfeliĉe ni devas daŭrigi la 19a-jarcentan barakton aŭ perdi nian historian ekziston.

Kiel ĝueble, kiam ni povas legi kaj verki eseojn pri enlandaj interesoj en Esperanto. Tiaj regionaj aferoj estas la aktualaj temoj havantaj universalan mezuron. Ekzemple, historio pri la golf-regiono de San Francisko. La historio de hispana popolo en San Francisko kaj la duoninsulo. La malapero de indianoj en Marin-Kantono. La rakonto pri la konstruado de la du golfpontoj. La historio de la montoj de Tamalpais, Diablo, kaj San Bruno. La lasta mort-duelo okazis en Daly City. La vivo kaj epoko de Jack London en la golfa regiono. La konstruado kaj planado de Orpordega Parko. La rakonto pri la Presidio kaj la nuntempa nacia parko establita de Kongresano Phil Burton.

Estas eblo daŭrigi en tiu ĉi maniero, sed la emo estas senfina. Realeco diktas al ni resti pli proksime al ĉiutagaj aferoj, kaj ŝajnas al mi, ke la redaktoro de EUSA sekvas prudentan kaj saĝan vojon. Vi ne meritas kritikon, sed kontraŭe, meritas nian profundan dankemon por la elstara ekzemplo de Esperanta aktivado. Bis! S-ro Redaktoro, Bis!

Elson B. Snow

[Efektive, mi vidas du eblecojn por

atingi la ELNA-Gazeton, pri kiu vi revas. Unue, oni povus eldoni ĝin suplemente al EUSA—eble kvar fojojn en la jaro—kaj kontraŭ ia suplementa aŭ aldona kotizo por tiuj, kiujn interesas tia revuo. Alia, kaj eble pli bona, metodo atingi ĝin estus, aperigi ĝin loke, fare de unuopulo aŭ de loka grupo (ĉu taŭga projekto por SFERO, eble?). Unu tia revuo, modesta sed ambicia, jam aperas: Arizona Suno, ĉe s-ano Edveno Grobe en Arizono; kaj laŭ mia kompreno, la rezultoj post apero de la unua numero—pli ol 100 abonoj el 25 landoj—estas kuraĝigaj.]

[More on the subject of male/female suffixes.]

Re letter of Diane Gorgen & Craig Wallace.

I'm all for equal rights, etc., but why mess up Esperanto? For those who are touchy, the proposal of the use of -iĉ as a masculine suffix should suffice, but not be obligatory.

Keep this up and the heroes of the Wild West might start complaining about the female assumption of animals and we won't have any more cowboys!

Prenda E. Cook

(1) It pleased me to see a woman raising the question of linguistic sexism in Esperanto. Almost invariably, over the years, it has been the men who show the most concern about the subject. At various times during the courses at San Francisco State men raise the question. Only then do the women show some interest in the question.

My husband Bill and I have tutored 4,905 postal course students during the past eight years. In all that time, with two or three exceptions, it has been men who comment on sexism as relates to the gender problem in Esperanto.

During the public meeting of the Academy of Esperanto in Warsaw (1987), a man raised this question. The moderator turned the question over to the only woman among the academy panelists—the famous Marjorie Boulton. She dismissed it as a frivolous notion and gave pretty much the same advice as you did in your comment after the Gorgen/Wallace letter: "... anybody ... who feels the need for such a suffix can use it ..." You mentioned Kamacho's use of "iĉ" in his book *Sur la linio*.

When the great Wm. Auld of Scotland was teaching the Esperanto courses here at San Francisco State, one young man

proposed the morpheme "ab". Prof. Auld discarded it as absurda.

Perhaps someone will come up with a solution that will receive wide acceptance. Diane Gorgen is a former postal student. I am glad to see her interest in this important matter.

(2) I count only three women in the Academy. Occasionally someone will mention this discrepancy. I have written the editor of *Letero de l' Akademio de Esperanto* about the need for more women in the Academy.

In the Apr.-June 1991 *Letero*, President Albault suggested procedures for selecting candidates for the Academy in the election year (1992). He wrote "... li skribas al ... li transdonas ..." In my letter I suggested that they avoid sexism in such sentences by use of the pronoun "tiu", since the instructions seem to imply that candidates should be men.

I recommend the use of "tiu" in such cases by all Esperantists. There is no need to write li/ŝi or even ŝli as one wag proposed.

Cathy Schulze

[At the most recent Northern California Senkrokodiliga Semajnfino a sketch was presented during which, in an interesting inversion, two Akademianinoj (Ellen Eddy and Cynthia Libby) were vetting for membership a Kandidato for the Academy (Bill Harmon), who continually emphasized the need for a male Academician to provide the organization with the leadership it needed to succeed. The last question asked him clarified the important managerial role that he would be asked to play in an all-woman Akademio: "Ĉu vi povas fari bonan kafon?"]

This is in answer to the letter by Diane Gorgen and Craig Wallace published in the newsletter 1991(6).

About 20 years ago someone proposed "-ab-" as a separate suffix for the masculine to be used in parallel with the feminine "-in-". Some of us saw the value of this additional suffix, but one powerful academician squashed it, and us, with one word: "ab-surd," he said.

If we look at this word in its Esperanto meaning, we see that he was saying that HE was deaf to the idea of "-ab-".

The editorial comment following the letter by Gorgen and Wallace points out that George Kamaĉo has been using "-iĉ-" for this purpose, but -iĉ- sounds too much like the derogatory -aĉ- to suit me. "Poetino, poetabo" has a better ring.

I would propose that we use -in- and -ab- only when really needed. If you have already indicated the person's gender, you can unambiguously use "poeto."

The suffix -ab- works better for animals than calling a bull "virbovo" and a stallion "virĉevalo." Man-horse? That sounds like a mythical character. So "bovabo, ĉevalabo."

We might consider "vir-" and "virin-" as separate roots, because we don't need "viro" to mean a person of either sex. We already have "homo." How many such words do we have? "Knabo, knabino, infano," for example. But "kuzabo, kuzino, kuzo"? Any ideas?

Now, on the subject of using "li" to mean he or she: this problem is not solved (at least not elegantly) by repeatedly writing "li aŭ ŝi," and the proposed "ŝli" does not have a pleasant sound, at least to my ear.

Writing in English I have been using "ze" and "zer" to mean she/he and "his/her," "him/her," successfully enough that some of my correspondents have adopted it.

So why not "zi" for "ŝi aŭ li"?

That's easier than trying to use "vi," "ni," "tiu," "ili," or "oni" to get around the problem. Attack it instead with "zi"!

Again, any ideas?

Martha W. Evans

[The suffix -ab- has also been proposed, unofficially, for bathroom fixtures (lavabo, necesabo), so I hope that you will forgive me for being less than enthusiastic about its possible adoption as a male suffix. -iĉ- is also distantly reminiscent of another Esperanto root that has nothing to do with maleness. In such words as "virbovo" and "virĉevalo," the sources are obviously not "viro-bovo," "viro-ĉevalo," but "vira-bovo," "vira-ĉevalo," forms frowned upon by the Plena Analiza Gramatiko but commonly used in colloquial Esperanto ("dikfingro," "novedzo," etc.).]

1991(6) was a good issue. Congratulations.

Tell Diane Gorgen (p. 11) that the feminists have an -INO suffix all to themselves, whereas the -O suffix for men has to be shared with the neutral or neuter nouns. Therefore, feminists are a privileged group. Do NOT change the "O" ending, leave it stand for neutral, or neuter nouns as well as for masculine nouns.

R. Mullins

[The -O ending says nothing about the

sex of a noun; it simply means that the word is, in fact, a noun. Where physical gender can or should be determined, it is currently indicated by the presence or absence of -IN. A masculinizing suffix, although not (in my opinion) necessary, would also not damage Esperanto's structure, since it would simply be replacing the currently-used null suffix.]

Ĉu vi supozas, ke Gorgen (ELNA-ano) kaj Wallace planas forigi la gramatikajn seksojn de la etnaj lingvoj?

Ili devus legi la verkojn de Zamenhof, precipe pri la reformistoj de tiu tempo.

Conrad Fisher

Responde al Mike Donohoo, mi dubas ĉu oni ĉefe bezonas plian perkomputilan kurson, aŭ ĉu la plej bona uzo de komputiloj estas perkomputila komunikado, tra la internaciaj retoj kiel Internet kaj Bitnet, kaj ĉe la esperanta forumo de Compuserve. Multaj homoj lernas la lingvon, sed forlasas ĝin ĉar ili ne povas fari ion per ĝi.

Kaj, mi petegas, ne uzu fuŝaĵojn kiel "softoj" se vi deziras helpojn de komputillertuloj! Tian aĉaĵon oni lasu al la poetoj.

Pierre Jelenc

Daŭrligo de paĝo 4

TEXAS

La esperantistoj de nord-orienta Teksaso kuniĝis la 15an de decembro ĉe la hejmo de s-ino Roan Orloff Stone por festi la naskiĝtagon de d-ro Zamenhof. Ĉeestis pluraj esperantistoj el tiu regiono kaj ankaŭ du neesperantistoj, kiuj legis pri la afero en la *Texarkana Gazette*. Post bongusta lunĉo, oni aŭdis la sonbendigitan prelegon de d-ro Mario Pei ĉe la universitato Brigham Young en Provo, UT, pri Esperanto. Oni ankaŭ aŭskultis kelkajn kantojn de la sonbendo *Jen Nia Mondo*. (raportis Roan O. Stone)

Rezulte de konsiliĝo, s-ino Candice Bowers provos enkonduki Esperanto-kurson ĉe la komunuma kolegio en Longview. Estos kurso por plenkreskuloj, sen poentoj. Se iuj havas ideojn, kiel allogi partoprenantojn, bonvolu informi ĉe la ĉi posta adreso. (raportis Roan O. Stone) Roan O. Stone, Rt. 1 Box 46C, Hallsville TX 75650

LANGUAGE IN THE NEWS

[Doesn't almost everybody in Nigeria speak English? Well... speaking charitably... maybe, sort of...]

Nigeria's new Minister of Education, Professor Fafunwa, is moving Nigerian students away from an education dominated by English. Nigeria was a British colony, and English has been Nigeria's official language. But it is hardly anyone's first language there, since the people speak a variety of African tongues.

For example, at Fafunwa's behest, nearly 100,000 elementary school students in Oyo, one of Nigeria's states, are being taught mostly in Yoruba, one of the country's three major languages. Many English school textbooks are now being translated into the major languages: Hausa, Igbo, Yoruba, Nupe, Ijaw, etc.

[From the *Chicago Tribune*, May 24, 1991; reported in *Saluton*, September, 1991.]

[500 years after Columbus ran into the Caribbean on his way to China...]

Jamaica, another former British colony, is debating whether to teach the local dialect (patois) of English in schools. This is an English-speaking country, but the patois is considerably different than standard English.

[From the *World Press Review*, June, 1991; reported in *Saluton*, September, 1991.]

[Venceremos!]

A federal judge has ruled that a South San Francisco meat processing plant's "English-only" rule for production workers [see EUSA 1991(4)] discriminates illegally on the basis of national origin.

U.S. District Judge Robert Schnacke said Friday he would issue an order forbidding continued enforcement of the rule, which has been in effect for the last year at Spun Steak Co. About half the company's workers speak Spanish. English is not a requirement for being hired.

The judge rejected the company's arguments that the policy was justified for reasons of safety and productivity.

"There are theoretically cases where there could be a business justification," said [lawyer Christopher] Ho. "But an employer has to meet a pretty high burden to show there's a neutral, business-related reason for the rule."

[From the *San Francisco Examiner*, October 5, 1991.]



RECENZE

Dorval, Deck: *Urd Hadda murdita!*
Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo,
1990. Serio "Stafeto" #13. 199 p. ISBN
90-71205-37-1. Ĉe ELNA: Kodo
URD001, Prezo \$15.95 (nemembroj) /
\$15.15 (membroj)

En la ĝenro de klasikaj detektiv-romanoj troviĝas ŝatata subĝenro, kiu nomiĝas la "mistero de ŝlosita ĉambro". Jen ekzemplo de la funkciado de tia ĝenro. Ekzistas domo, kun kradoj sur ĉiuj fenestroj kaj seruroj sur ĉiuj pordoj. La domon cetere gardas komputilestrata alarmsistemo sufiĉe laŭta por veki tutan kvartalon, kun propra interna energicentralo, tial, ke oni ne povu malŝalti ĝin de ekstere. Unu vesperon la domposedanto invitas pasigi la nokton siajn tri amikojn. Li ŝaltas la alarmsistemon, kaj la gastoj enlitiĝas. Kiam ili matene ellitiĝas, la alarmsistemo ankoraŭ bone funkcias, la domo restas entute sekura ... kaj la dommastro kuŝas sur la tapiŝo de sia studejo, mortigite de peza objekto en la mano de iu nekonata murdinto!

Tian problemon frontas Ĉefinspektoro Ksavero Kant en ĉiu tiu lasta, kaj eble fina, romano en la serio, kiu komenciĝis per *Jaŭto veturas for ... kaj veturigas la morton!*, kaj kiu lingve iom devojiĝis kaj misfamigiĝis per *Kazinski venis tro malfrue!* kaj *Nigra magio*. La nuna Kant, malpli juna ol tiu en *Nigra Magio* (en kiu li konatiĝis kun la bela filino de enketjuĝisto Sol—kun kiu li poste ne edziĝis!), kune kun sia fervora subulo Oktavo Dutri, kun kiu li ofte parolas Esperantlingve, devas decidi, kiu el la tri suspektatoj ja faris la murdon; aŭ, ĉar evidente ja temas pri tia "mistero de ŝlosita ĉambro," ĉu iu el ili kulpas. Pri la solvo mi rajtas diri nenion pli.

La romano ne estas lingve eksperimenta, kiel la du mezaj romanoj en la serio, sed facile legebla; kvankam ekzistas pluraj neoftaj radikoj, la fiaskaj partikloj, kiuj tiom makulis *Kazinskikaj*, iom malpli, *Magion*, tamen tute mankas. Mi legis la tutan libron en unu legperiodo, kaj trovis ĝin ne nur legebla, sed eĉ nedemetebla.

La kovrila bildo evidente tute ne rilatas al la enhavo de detektiv-romano, sed la

legonto povas supozi, ke FEL havis ian kialon por uzi ĝin...

Don Harlow

Tišljar, Zlatko: *Frekvencmorfemaro de parolata Esperanto*. Zagreb: IKS. 41 p. Broŝurita. Ĉe ELNA: Kodo FRE001, Prezo \$3.50 (nemembroj)/\$3.30 (membroj)

La ilaro por la Zagreba Metodo de Esperanto riĉiĝis per nova volumeto, aperinta antaŭnelonge (mankas indiko pri la aperdato). La jam fama Zlatko Tišljar kompilis *Frekvencmorfemaron de parolata Esperanto*—utila ilo por tiuj, kiuj instruas aŭ lernas laŭ la supre menciita metodo. Mi kuraĝus aserti, ke tia libro utilas ankaŭ por tiuj, kiuj sole lernas Esperanton, kaj fakte, por ĉiuj instruistoj (antoj) de Esperanto.

El korpuso de 24 280 vortoj (konsistantaj el 41 456 morfemoj), la aŭtoro kompilis liston de 1 343 morfemoj, kiuj formas la enhavon de la prezentata laboraĵo.

Post la enkonduka parto (ne tre facile komprenebla por nefakulo), sekvas la listo de morfemoj, aranĝitaj laŭ ties ofteco. En la tri kolumnoj de tiu ĉi parto, troviĝas (orde): la ordnumero, la frekvenco kaj la morfemo mem. Fine de la 41-paĝa libreto troviĝas la listo de la samaj morfemoj, alfabete ordigitaj. En ĉi tiu parto, ni havas denove ordnumeron, la morfemon, kaj ties ordnumeron el la unua parto.

Utila verko! Bedaŭrinde, ĝia teĥnika aspekto estas tute sub la nivelo atendita. Unue, pro la fakto ke la uzita tajpilo (aŭ printilo) ne posedis la necesajn supersignojn, oni ilin metis pli poste permane. Tio donas malallogan aspekton. Ankaŭ la paĝaranĝo estas tute fuŝa, kaj tio povas krei eĉ konfuzojn (p. 27).

Ni esperu, ke la sekvonta eldono, cetere pli kompleta, aspektos pli inde.

Ionel Onet

Austin, Manjo: *Insulo de revoj*. Pisa: Edistudio, 1989. 95 p. ISBN 88-7036-038-X. Ĉe ELNA: Kodo INS003, prezo \$16.75 (nemembroj) / \$15.90 (membroj)

En unu ĉambro de nia hejmo troviĝas tuta stako de libroj kun la marko "Harlequin". Ĉiun jaron mi dum unu tago eksuferas sopiradon por tiuj libroj kaj legas ses aŭ ok el ili en la daŭro de kelkaj horoj. Post tio, mi estas sata por ankoraŭ unu jaro.

Insulo de revoj iom similas al Harlequin-libro... sed ne tute, kiel mi klarigos poste. En 95 paĝoj ni sekvas la t.n. aventurojn de Teresa, angla dommastrino kiu, provizore forlasinte sian familion por ferii sole, flugas al amikino en Italio. Tie ŝi konatiĝas kun la juna kaj alloga Renato, inĝeniero kiu ĵus revenis al sia hejmurbo por ferio, kun kiu ŝi pasigas multajn paĝojn sur la plaĝo, kaj poste sur la lito (mi preskaŭ skribis: sub la litkovriloj, sed temas pri somero en Italio...). Post entuziasma kaj pasia amafero, Renato reiras al sia laboro kaj Teresa reflugas al Anglio, kie ŝi, kun la edzo kaj gefiloj, vivos feliĉe kaj por ĉiam.

La ĉefa diferenco inter ĉi tiu libro kaj miaj arlekenaĵoj estas, ke en la arlekenaĵoj troviĝas ia luktado inter la heroino kaj ŝiaj ĉirkaŭaĵoj. Ĝenerale la heroo estas, se aminda, almenaŭ neŝatebla. Ofte li havas fratinon (onklinon, patrinon, eksedzinon), kiu sufiĉe frue profetas por si la estontan geedziĝon, kaj batalas por malhelpi tion. En *Insulo de revoj*, la heroo estas ankaŭ ŝatinda (aŭ li estus ŝatinda, se li efektive havus distingeblan personecon), kaj ĉiuj parencoj, precipe la inaj, entuziasme kunpuŝas la du. La sola lukto estas tiu inter la heroino kaj ŝiaj anglaj moroj; kaj tiun lukton ŝi reduktas al la sama nivelo kiel la decido, kiun naĝkostumon porti por tiu mateno.

Se paroli pozitive: la lingvaĵo estas facila, kaj la libro estas dividita inter 15 mallongaj ĉapitroj. Mi povas rekomendi ĝin al progresantaj studentoj, kiuj deziras legi ion sufiĉe facilan kaj leĝeran, kiu ne jukos la inteligentecon.

Don Harlow



VOLAS KORESPONDI

Amikeco trans limoj

Nota: Nomojn kaj adresojn ni prezentas dikliteraj; familiaj kaj urbaj nomoj estas MAJUSKLAJ. Komojn ni uzas por montri sangon inter linioj en adreso.

ĈEĤOSLOVAKIO

F-ino Marie HAJNÁ, Sidliste 571, POCATKY 39464, okr. Pelhrimov. 16-jara studentino de sanzorga mezlernejo, interesiĝas pri muziko, filmoj, manieroj de usona vivo, kutimoj, kulturo, historio, kolektas poŝtmarkojn, bildkartojn, talismanojn.

Milan KRÁKORA, 332 02 STARY PLZENEC 543. 32-jara viro, kolektas fotojn kun subskriboj de geaktojoj, gekantistoj kaj grupoj, preferas korespondi kun geesperantistoj en kaliforniaj metropoloj.

KAMPUĈIO

CHEAM PHEA, #9E Street 278 krom 38, Sangkat Bung keng kang I, Khan cham kar morn, PHNOM PENH. 17-jara lernanto.

BIN CHAN NA, No. 221 str. Tou Samut, kr. 59 Sang Kai, TONLE BAS. 18-jara lernantino.

KUBO

Gilberto RIBALTA Olivera, Ave. 307 #16807 % 168 y 170, Rpta Lutgardita Boyeros, C. HABANA. 19-jara studento de elektroniko, interesiĝas pri lingvoj, sporto kaj muziko, ankaŭ angle.

Carlos E. HERNÁNDEZ Montes de Oca, Calle: 121 #27408 et 274 y 276, CP 40100 MATANZAS. 30-jara inĝeniero, pri sociaj problemoj, literaturo, scienco, popolaj kutimoj, diversaj temoj.

LITOVIO

Vidas LIUBINAS, P.O. Box 12, 234500 KARZLU RUDA. 49-jara fraŭlo, ŝatas vojaĝojn, volas interŝanĝi poŝtmarkojn kaj bildkartojn.

RUSIO

NEĀEV Ruslan, 603024 NIĤNIJ NOVGOROD, str. Genkinoj 102-32. 15-jara lernanto, kun gejunuloj, kolektas poŝtmarkojn, bildkartojn kaj kovertojn, ankaŭ angle.

Vladislav ANISIMOV, 399340 USMAN, Lipeckaja obl., str. Lenina d. 81 kv. 30. 16-jara viro, interesiĝas pri la radiotekniko kaj bala dancado, kolektas monerojn, poŝtmarkojn (floroj kaj lumturoj).

Elena DJACKOVA, 119146 MOSKVA, Komsomolskoj pr. d. 31 kv. 11. 35-jara kinmeĥanikistino, ŝatas legi historiajn, fantaziajn, detektivajn librojn, interesiĝas pri vivmanieroj en aliaj landoj.

TANZANIO

M.A. MAGALLADY, P.O. Box 751, KIGOMA. 35-jara fraŭlo, interesiĝas pri vojaĝado, muziko, filmo, sporto (futbalo).

UKRAINIO

Kolja PUDA, per Proreznoj 4/16, 245110 SHOSTKA, Sumska obl. Interesiĝas pri vojaĝoj, kolektadoj, korespondadoj, ktp.

Juri KORSUN, p.Box-7, 245110 SHOSTKA-7, Sumska obl. Interesiĝas pri vojaĝoj, kolektadoj, korespondadoj, ktp.

UZBEKIO

LEBEDEV Sergej Jureviĉ, Bobur str. 67-10-13, 700090 TASKENT. 35-jara aviadingeniero, interesiĝas pri praktika kaj socia psikologio, interkomunikado, praktikaj metodoj plibonigi intelektan kaj informan agadon, sanigaj metodoj.

NEKROLOGOJ

SOLZBACHER

William A. Solzbacher, 84, a retired official of the Voice of America and a past president of the Esperanto Association of North America, died on Dec. 27, 1991, at the home of a daughter in Waianae, Hawaii after a series of strokes.

Dr. Solzbacher was born in Hannes, Germany. He graduated from the University of Cologne, where he received a doctorate in political science and economics. He lived in Luxembourg and Belgium before coming to the United States in 1941 and settling in the New York area. He was an editor of the Catholic Intercontinental Press and taught at the College of Mount St. Vincent before joining the VOA. He joined the VOA in 1953, accompanied it to Washington when it was transferred there in the mid-1950's, and was an assistant policy officer in the program manager's office when he retired in 1977. He continued to live in the Washington, DC, area until 1989, when he moved to Hawaii.

As a young man in Europe, Dr. Solzbacher was a journalist and activist in Catholic peace movements. He was also an Esperantist, former president of the Esperanto Association of North America, co-author of *Esperanto: The World Interlanguage*, and a member of the Academy of Esperanto. Dr. Solzbacher was responsible for the series of Esperanto broadcasts from Voice of America in 1960 and 1961.


(Modified from the Washington Post, Dec. 31, 1991)

Daŭrigo de paĝo 1

efit greatly from the courses. In many cases, the education that they receive at SFSU will be more respected than it is in the US, and their societies will be more interested and open to the idea and ideals of Esperanto. Few Americans have the time to take on a new project, even when they become intrigued with Esperanto. In contrast, Latin American society still affords more time and offers greater support to the pursuit of philosophical ideas. Latin America is more aware of the language problem, so the Esperanto movement has greater potential for rapid growth. A few key people can have a big impact.

For these reasons, I believe the time is ripe to increase our educational outreach to the rest of North America. I deeply support Cathy Schulze's proposal for the creation of a special scholarship fund for Latin American students to study Esperanto at our SFSU program. Dori Wheeler, one of our most active members, who has supported and attended our SFSU program every year since the beginning, has located two outstanding students from Costa Rica. She highly recommends them as committed esperantists who yearn to perfect their language knowledge, and as students of linguistics, who will later be in a very favorable position to teach and promote Esperanto when they become professors.

This is a special opportunity, which warrants your special gift. Most Americans are poor in free time. We cannot donate weeks, or even many days to the Esperanto cause that we believe in so deeply. Yet most of us, although we are not wealthy, have the discretion to spend \$25-\$100 for a good cause. Here is a good cause: the support of a few outstanding Latin American students who have the time, but not all of the necessary finances to come to SFSU, and return to their countries to become the seeds of their burgeoning movements. Now is an excellent time to support the growth of Esperanto in North America in a way which may, in the coming years, strengthen the movements of all Western Hemisphere countries and lead to Esperanto contacts and congresses without the need to cross an ocean.



VOJAGU ESPERANTE EN 1992

Esperanto-Kursoj ĉe SFSU
June 29-July 17
 "The Best in the World"

ELNA Convention
July 17-23
Berkeley, California

The kongresejo is the University of California, Berkeley—one of the most interesting and beautiful campuses in the U.S. There is plenty to see on the east side of the bay: Oakland's Museum is the best of its kind in the country; the university museums are great; and touring this part of the world is a treat.

The price is right, the location attractive, and local Esperantists are eager to host samideanoj from around the world.

The aligilo for the ELNA Convention and a detailed brochure about the UK in Vienna are included in the mailing of this edition of *Esperanto U.S.A.*

Universala Kongreso de Esperanto
July 25-August 1
Vienna, Aŭstrio

The 77th UK takes place in a time of great and fundamental change in all of central Europe, and due to Vienna's central location, will attract a great many Esperantists from that area. For a number of reasons UEA had to change the original plan naming Prague; but you can visit Prague after the UK.

Vienna is a cosmopolitan, sparkling city yet small enough to be knowable and easy to get around in. The Kongresejo will be at UNO City, the home of the United Nations in Vienna, just across the Danube from the old city. It is one of the most modern and beautifully-equipped convention centers in the world.

Post-kongresa Ekskurso
August 1-10

Hungary & Czechoslovakia
 Visit beautiful Bratislava, Budapest, Tatra Mountain area, Tabor and PRAGUE. A great trip visiting Esperantists along the way.

5a Pacifika Konferenco
August 17-22
Qingdao, Ĉinio

Qingdao is a center of Esperanto activity, and the preparations for a cultural feast are near completion. The price will be right! A number of pre-and post-congress excursions will be offered, including a cruise on the Yangtze

River and a trip to exotic Tibet.

A shared double in The Huanghai Hotel (the kongresejo), all meals and excursions during the conference (6 days, 5 nights) is only \$473. The costs of the pre- and post-conference excursions are not yet fixed. Airfare to and from Qingdao from the West Coast is approximately \$1400, slightly higher from the East Coast.

The Unua Bulteno for Qingdao was sent directly to subscribers to *El Popola Ĉinio* and a Dua Bulteno with final prices will be sent to all who have signed up. Esperanto Vojagŝervo is the official peranto for the Pacifika Konferenco, and we will do all we can to help you if you would like to go.

It will be difficult to choose between Vienna and Qingdao—but you should seriously consider taking part in one or the other if at all possible.

Esperanto Vojagŝervo
6104 LaSalle Avenue
Oakland CA 94611
(510) 339-2001



President: Angela Harlow (1993), P.O. Box 551, Pinole, CA 94564, tel. (510) 222-0187
 Vice President: Dr. Grant Goodall (1993)
 Secretary: Virginia Stewart (1992)
 Treasurer: John B. Massey (1994)
 Other Board Members: Prenda Cook (1992), Frank Helmuth (1992), Dr. Jonathan Pool (1992), Dr. E. James Lieberman (1993), Sherry Wells (1993), David Wolff (1993), William R. Harmon (1994), William H. Schulze (1994), Mark C. Stephens (1994)
 Commissioners: Don Coleman (Local Clubs), John Dale (Legislative Affairs), Jim Deer (Tape Service), Lucy Harmon (Travel Affairs), William R. Harmon (Central Office), Dorothy Holland-Kaupp (Correspondence Courses), R. Kent Jones (Science & Technology), Dr. Julius Manson (United Nations), John B. Massey (Wills and Gifting), John B. Massey, William H. Schulze and Sidney V. Steinberg (Kapitala Fondusa Komitato), John Mathews (Service Clubs), Catherine Schulze (Postal Course)
 Director, Central Office: Mike Donohoo
 Vice-Director, Central Office: Ionel Onet
 ELNA Archivist: Ionel Onet

Any member wishing to assist in the work of any of the above named commissions or committees should communicate with the member(s) shown.

ELNA Dues for 1992

Regular	\$30
Family	\$45
Youth (under 27)	\$15
Limited income	\$15
Sustaining	\$60
Life	\$600

ELNA is a non-profit organization functioning under IRS paragraph 501(c)3. Donations are tax-deductible.

A separate supporting category, "Friend of Esperanto," has been established. A Friend of Esperanto pays \$10 per year.

Libraries and other institutions can subscribe to *Esperanto U.S.A.* at the special rate of \$15 per year.

UEA dues 1992

Member-Guidebook only (MG)	\$ 8.00
Member-Yearbook only (MJ)	\$18.00
Member-Subscriber (MA)	\$45.00
Societo Zamenhof (additional)	\$90.00
Subscription only to Esperanto	\$27.00
Subscription only to Kontakto	\$14.00
Life Membership in UEA	\$1125.00

Send payments for UEA memberships or sub-

scriptions to ELNA, Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Make all checks payable to ELNA.

MOVING? DON'T LEAVE ESPERANTO BEHIND! If you have moved recently or are planning to move in the near future, don't forget to sent a change-of-address card to the ELNA Central Office, Box 1129, El Cerrito CA 94530. This will assure your continued receipt of the Newsletter and other information. If you don't have a stamp handy, give the CO a call at (510) 653-0998. Thanks!

DEADLINE FOR MATERIAL FOR ISSUE 1992(3) of Esperanto U.S.A. is April 25, 1992

ELNA Newsletter
Volume 28, No. 1
ISSN 1056-0297
Esperanto League for North America, Inc.
P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530
Telephone: (510) 653-0998
Editor: Don Harlow